eLIBRO

Andras Sütö

Palmo-dimanĉo de ĉeval-komercisto

INKO

Andras Sütö

PALMODIMANĈO DE ĈEVALKOMERCISTO

Dramo en tri aktoj

Surbaze de kroniko de Heinrich von Kleist

El la hungara tradukis Jozefo Horvath

*e*LIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-172-0

inko@omnibus.se

http://www.omnibus.se/inko

AŬGUSTO 2002

Rolantoj

Mikelo Kolhaas
Elinjo
Nagelschmidt
Herse
Maria
Barono Venceslao de Tronka
Barono Günther
Francisko Müller
Kallheim
Hinz
Kunz
Zauner
Eibenmeyer
Intendanto
Doganisto
Kastelkomandanto
Fratino Antonia
Marteno Luther
Henriko
Mann
Kastelsoldulo
Tribunalaj servistoj, servutuloj, burĝoj

Okazas en la unua duono de la 16-a jarcento.

Ĉu estis ĉu ne la fato
Nigre flugrajdis la fato
En Kolhaasenbrück
Sur komerciston
Mikel' Kolhaas frapis la fato.
Fulmhaste venas la fato
Stalone sturmas la fato
Ho ĉar sen invit'
Kaj sen anonco
Nigrefluge rajdas la fato.
Sed tire pasas la fato
Venis rajde iras paŝe
Ho tire pasas
En polvo rampas
Maleme nin lasas la fato
Sed alvenos ja konsolo
Al senĉese esperanto
Mikelo Kolhaas

Ĉi glavanĝelo
Terprofunden tretos la faton.
La tago de l' justec' ekhelos
Se iu spite pledos
Fajre kaj glave
Kiel Mikelo
Kolhaas batalis l' arkanĝelo

UNUA AKTO

Loĝejo de Mikelo Kolhaas en Kolhaasenbrück. Pordo, fenestro malfermitaj, kvazaŭ post koŝmara nokto oni komencus tagon pli bonan (aŭ post severa vintro printempiĝus, aŭ mortinto eldoma estus jam sepultita) aŭ — pro ia kaŭzo — oni jam povus fidi al la ekstera mondo. Sonoj de luterana diservo, ankaŭ Maria de tempo al tempo transprenas la melodion: devote kaj mallaŭte ŝi kantas, preĝas. Post kelka tempo estiĝas bruo sur la ĉefplaco de la urbeto (bojado, krioj): "Kaptu lin! Ŝnurligu! Bastonu lin! Elstampfu al li la intestojn! Sinjoro Günther, mi ne vidas lin!" (Supozeble la voĉo de sinjoro Günther:) "Grego de gapuloj! Stultaj durcerbaj kampuloj!" Kun tio la kriantoj brue pretersturmas. Maria konversacias tiomnure kun Dio, ke ŝi eĉ ne aŭdas la voĉojn. Klopodas kunkanti la elpreĝejan melodion. En la pordo al la urboplaco aperas Nagelschmidt anhelanta, kursufokata. Momenton li hezitas, ĉu enpaŝi (Maria staras aŭ sidas dorse al li), post novaj paŝobruoj Nagelschmidt enŝteliĝas kun rapidaj katopaŝoj, kaŝas sin malantaŭ la kurteno de la lavniĉo. La elpreĝeja kanto plifortiĝas, ankaŭ Maria kantas pli laŭte. En la pordoframo haltas kastelsoldulo kun skurĝo enmane, poste li enpaŝas; kun ŝuldenda respekto li atendas, ĝis Maria finas la kantadon.

KASTELSOLDULO Kie troviĝas Nagelschmidt?

MARIA Nagelschmidt?

KASTELSOLDULO Ĉi tien li devis enkuri.

MARIA Mi ne vidis lin. Sed pro kio li devus enkuri ĉi tien?

KASTELSOLDULO Ĉar li ne plu estas servisto, sed koramiko de la domsinjoro, via pieviva mastro.

MARIA La soldula moŝto eraras ...

KASTELSOLDULO La soldula moŝto povas erari, sed ne lia mastro, barono Günther. La barona moŝto deklaris, ke ĉi tiu ĉevalŝtelisto ...

MARIA Ĉevalkomercisto ...

KASTELSOLDULO ... ĉevalŝtelisto. Ĉi tiu ĉevalŝtelisto estas fidelulo de Tomaso Münzer. Kiam okazis la ribelo, li ŝtelis du tirĉevalojn de la barono. La servutuloj de la barono atestas ...

MARIA La servutuloj de barono Günther estas pendumitaj.

KASTELSOLDULO Jes, sub la pendumilo ili atestis: la tirĉevalojn ŝtelis Nagelschmidt por Münzer.

MARIA Münzer estas senkapigita.

KASTELSOLDULO Mi vidis tion. Mi mem ĉeestis, kiam oni senkapigis lin en Mülhausen. Mi staris flanke de barono Günther, ĵusproksime mi vidis,

kiel la kapo de ĉi tiu Antikristo falis en la polvon kaj forruliĝis, kaj Münzer kaptadis post ĝi, kvazaŭ li volus ĵeti sian propran kranion inter nin. *(Ridas.)*

MARIA Dio mia, kial vi rakontas tion al mi?

KASTELSOLDULO Mi rakontas, ĉar barono Günther asertas, ke Nagelschmidt partianis al la Antikristo, li ŝtelis niajn tirĉevalojn kaj nun li koramikas kun honesta ĉevalkomercisto.

MARIA Mia mastro, sinjoro Kolhaas ne amikas kun ĉevalŝtelistoj. Antaŭ Dio kaj homo mi atestas, ke li ne simpatiis kun la ribelantaj servutuloj, nek kun Tomaso Münzer. Sinjoro Kolhaas adeptas al la leĝa ordo kaj admonadis al nenio alia ol al toleremo. Pli milda kaj pacema ol li, estis nur nia Sinjor' Kristo, ankaŭ via mastro bone scias tion, li estas ja lia delonga kliento, same kiel la barona moŝto Venceslao de Tronka. Sinjoro Mikelo Kolhaas obeas nur al la vortoj de lia pastra moŝto, doktoro Marteno Luther, kaj ĉiufoje li prenis ties partion, se tiu Münzer atakis kaj nomis lin baptano Kaŝmalica, Graskapulo, eĉ Azenviando.

KASTELSOLDULO Kaj Nagelschmidt?

MARIA Mi petas vin, lasu min en paco! Baldaŭ hejmenvenos sinjoro Kolhaas kaj li, ja tiel kolombanima, eĉ regalos vin per glaso da vino — rekompence por via impertinento. Se iu ĵetas sur vin ŝtonon, reĵetu sur tiun panon — jen tia estas mia mastro. Se vi volas koni lin, legu la Biblion! Kaj se vi volus koni la Biblion: ĵetu unusolan rigardon al la vivo de Mikelo Kolhaas! Li estas la enkorpigita Dekalogo kaj ties observo en unu persono.

KASTELSOLDULO Se tiel, mi do iras. Por esti vartistino, vi trosaĝiĝis ...

MARIA Nur tiom, ke mi ne toleras viajn stultajn kalumniojn en la domo de sinjoro Kolhaas.

KASTELSOLDULO Pokaleton da vino ...

MARIA Donu al vi via mastro, kun kiu vi plezuriĝas pri dehakitaj kapoj. Kaj se vi nun ne forportos vin, mi malbenos vin.

KASTELSOLDULO *(time)* Ĉu eble vi estas sorĉistino?

MARIA Ĉiela Patro reganta en la alto ...

KASTELSOLDULO *(ŝtopante la buŝon al Maria)* Silentu! Aŭ mi silentigos vin ... Mi petegas vin ...

MARIA *(liberiginte sin el la ĉirkaŭpremo de la soldulo)* Mi petas nur: mildeco kaj toleremo plagu vin ...

KASTELSOLDULO Sed ne pli ... sed ne pli ... *(Li forkuras.)*

(Trosufiĉis la konfido: oni devas fermi la pordon kaj fenestrojn. Poste Maria rapidas malantaŭen, en la kuirejon. Nagelschmidt aperas el post la kurteno, sidiĝas al la tablo. Maria portas vinon, metas ĝin antaŭ lin. Nagelschmidt volas versî al si.)

MARIA La glaso apartenas al sinjoro Kolhaas. Propre ankaŭ la vinon mi portis por li. *(Surtabligas plian glason. Nagelschmidt versîas al si, trinkas. Maria rigardas lin.)* Do tamen vi troviĝas ĉi tie.

NAGELSCHMIDT Hmhm. *(Trinkas.)*

MARIA Kio okazos, se iufoje la pordo ne estos malŝlosita? *(reage al lia ekrigardo al la fenestro)* Nek la fenestro? *(post lia denova serĉrigardo)* Nek la kamentruo. Nek la serurtruo.

NAGELSCHMIDT Via koro restos aperta.

MARIA Ĉu mia koro? Pli konsilindus klarigi vian disputan aferon kun sinjoro Günther.

NAGELSCHMIDT Ĉu mi ne faradas tion senĉese? Ĉiufoje, kiam li ekvidas min, li ekblekas: kaptu la ĉevalŝteliston! Je tio mi ekfrapas la stomakon al la kastelkomandanto kaj vi ...

MARIA ... kaj mi nur asertas: tuta Kolhaasenbrück jam scias, kien vi kutimas rifuĝi. Vi eĉ ne zorgas, ke la botopintoj ne vidiĝu el sub la kurteno. Nek vi atentas, ke per via konduto vi damaĝas la reputacion de sinjoro Kolhaas. Ofte oni vidas vin kune. Ie hazarde oni konfuzos vin ...

NAGELSCHMIDT Ĉu nin? La kulpon kun la virto? La leĝobservulon kun la leĝtretulo? Defore haladzas el mi la eksservutula pasio, kriis ankaŭ lastfoje sinjoro Günther. Kvankam eĉ mia patro ĉevalkomercis.

MARIA Bedaŭrinde, li diras la veron. Sinjoro Kolhaas havas apud vi palmodimanĉan odoron ...

NAGELSCHMIDT Vi uzas la vortojn de ŝia moŝto Elinjo. Ŝi karakterizas la naturon de Mikelo kiel palmodimanĉan. Ankaŭ al tiu pedikulo vi eĥis vort-post-vorte sinjorinon Elinjo.

MARIA Mi ne hontas esti la eĥo de sinjorino Elinjo. Ŝi ja estas tiu de nia Sinjor' Kristo ...

NAGELSCHMIDT Kaj mi?

MARIA Ĉu vi?

NAGELSCHMIDT Kiam mi asertas: la regantoj ne estas la mastroj de la glavo, do de la publika potenco,

sed ties servistoj. Sekve ili ne rajtus fari ajnon, kio ĝuste plaĉas al ili. Kies eĥo mi estas, Maria, asertante tion?

MARIA Asertante tion vi estas la eĥo de via kapo propra, falonta en la polvon. Grinco de viaj vertebroj en la nodo de la ekzekutista ŝnuro, fileto.

NAGELSCHMIDT Kaj se mi diras tion ne en mia nomo, sed laŭ Dia ordono ... *(Dume enpaŝas Kolhaas, kun lulĉevalo subbrake. Kun rideto li aŭskultas la predikantan Nagelschmidt.)* ... se tiel mi parolas: la potenco de la glavo apartenas al la tuta komunumo, ne al unusola homo, Danielo sep, Apokalipso ses; kaj se iu verdikto ne estas justa, la kristana komunumo devas ĝin rifuzi, Nombroj kvar, verso deksep ... kaj se oni senfeligas kaj senplumigas ĉion, kio vivas, Miĥao tri ...

KOLHAAS ... kaj se oni senfeligas kaj senplumigas, petu kaj estos donite al vi, serĉu, kaj vi trovos, frapu, kaj estos malfermite al vi, Mateo sep ..., kara amiko Nagelschmidt.

NAGELSCHMIDT Bonvenon, Mikelo! *(Ili interbrakumas.)*

KOLHAAS Vi jam denove brulincitas. Ĉu vi volas instigi Marian al ribelo?

MARIA Nu, estus miraklo ...

KOLHAAS Ĉu vi ĉiuj troviĝas en bona sano?

MARIA Dank' al Dio, ni bone fartas, sinjoro. Sinjorino Elinjo kun la infano en la preĝejo, la servistoj ĉe la ĉevalaro ... kaj ĉio en ordo. Kaj ...

KOLHAAS Via filo Herse ...

MARIA Jes, sinjoro, mia unusola filo ...

KOLHAAS ... jam devas alveni. Mi direktis lin al Tronka kun du nigraj ĉevaloj. Hieraŭ ili ekvojis el Lejpcigo, kaj mi venis tra Dresdeno.

NAGELSCHMIDT Ĉu vi ne vendis la nigrajn?

KOLHAAS Sub tridek orguldenoj mi ne povas vendi ilin. Kiaj estas tiuj du ĉevaloj, amiko?

NAGELSCHMIDT Eĉ kvardek ili valoras ...

KOLHAAS Ne ĉevaloj ili estas, sed ebonaj statuoj pakitaj en vato. En Lejpcigo mi aĉetis mirindajn sonoriletojn por sur iliaj koloj.

MARIA Mi kuraĝus veti, sinjoro, ke laŭ la peto de mia filo vi aĉetis ilin.

KOLHAAS Senpete — laŭ lia delonga deziro. Knabino ne sopiras al sia amato, kiom via filo al belsonaj sonoriletoj.

MARIA Kiam ni ankoraŭ estis papistoj, infanaĝe mia anĝeleto multe messervis. Li kutimas diri: veturi sur ĉevalo kun sonorileto egalas kvazaŭ diservon.

NAGELSCHMIDT Kaj li messervas kun ĉevaloj. Gratias agamus Domino Deo nostro ... *(Ridas.)*

MARIA Blasfemulo *(al Kolhaas)* Via moŝto faru ion por la savo de ĉi tiu homo. Sub niaj okuloj li marŝas en la inferon aŭ almenaŭ sub pendumilon.

KOLHAAS Kion li denove misfaris?

MARIA Ĉu vi ne aŭdas, kiel malpie li parolas pri sanktaj aferoj? Liajn agojn mi ne kapablas prijuĝi, por diri nur ekzemplon, denove li frapis la kapon al la kastelkomandanto, sed liajn vortojn mi orele atestadas, vi mem aŭdis ilin, enpaŝante. Li incitas per ili la regantan potencon — kontraŭ si mem kaj ankaŭ kontraŭ ni, li ja estas amiko de la domo. Ne estu tiel tolerema al li, mi petegas vin! Toleremo estas kulpo ... Ankaŭ la tolerema boneco estas kulpo ... *(For)*

NAGELSCHMIDT Kulpo!

KOLHAAS Leĝere vi prenas la aferon. Aŭskultu min, Karolo: la ribelo forpasis, Dio ripozigu la

mortintojn. Benu la sorton, ĉar parolante pri vi, ni ne devas diri: Dio ripozigu lin. Danku la vivon al lia pastra moŝto doktoro Luther; ke vi obeis al li, al mi kaj ne al Tomaso Münzer.

NAGELSCHMIDT Mi obeis al la diablo.

KOLHAAS Se tiel vi nomas la prudenton, la pacan solvon de aferoj ...

NAGELSCHMIDT ... ties bagateligon.

KOLHAAS Intertraktadon anstataŭ bruligado, forton de amo anstataŭ hombuĉado, laŭleĝan validigon de la vero anstataŭ leĝotreto, ĉio ĉi kune estu do diablo. Vin savis ĉi tiu diablo.

NAGELSCHMIDT Ĉu doktoro Luther instruis ĉiam ĉi tion? Haku, strangolu, piku kaj batu ilin, aperte kaj kaŝe, kie ajn vi trovas ilin ..., ĉar ne ekzistas pli damaĝa kaj diabla, ol la ribelanta homo. Oni devas mortbati ĉiujn kiel rabiajn hundojn; se vi ne mortbatos lin, li disbatos vian kapon kaj la tutan landon. Ĉi tie ne paroleblas pri pacienco, nek pri indulgo; ni travivas la epokon de glavo kaj kolero, ne tiun de pardono. Kiu verŝas sian sangon por la superuloj, konsideriĝos vera martiro antaŭ Dio ... kaj kiu mortas flanke de kampuloj,

eterne brulos en la fulga infero. Kiu diris tion? Ĉu ne doktoro Luther diris tion?

KOLHAAS Mi scias. Tiam vi deturnis vin for de li. La senesperiĝo igis lin tiel paroli.

NAGELSCHMIDT Bela prozorgo. Batu, haku, piku, strangolu ilin laŭ la ordono de la amo, Epistolo dektri al la Romanoj, furaĝon, ŝarĝon kaj vergon al la azeno, por la kampulo konvenas avenpajlo. Kiel rabian hundon strangolu ilin, sen selekti, se troviĝus senkulpa inter ili, Dio ja savus lin, kiel faris al Loto kaj Jeremio. Mi do estas Loto kaj Jeremio. Min li savis. Ĉar krom ŝteli du ĉevalojn de sinjoro Günther por la ribelantoj, mi faris nenion. Mi nur konsideradis, hezitadis.

KOLHAAS Ĉu vi insistas pri via fiksa ideo, ke vi malsaĝe preterlasis la pendumilon? La radumadon? La ardan feron inter viaj ripoj?

NAGELSCHMIDT Mia samsanga frato, mia onklo kuŝas en la tero. Se ĝustatempe mi estus alkondukinta la ĉevalojn, ili ankoraŭ povus forkuri.

KOLHAAS Ili estus povintaj resti ankaŭ en paco. La ribelo estas subpremita. La ribelantoj do ne pravis.

NAGELSCHMIDT La vero apartenas ĉiam al la venkintoj, kompreneble.

KOLHAAS Kia vero estas, kiu venigas siajn portantojn sub pendumilon? Senrespondeca! Almenaŭ fruenaskita. Kia racio, kia saĝo estas, kiu konsideras la fruenaskitan veron vivtaŭga. Kiel vi opinius pri la Naturo, se ĝi malsaĝigus kolombon ovumi en februaro, bovinon idumi en kraka frosto? Ĉu vi ne dirus, ke la Naturo perdis la saĝon?

NAGELSCHMIDT La revolucio ne estas popola moro por konformiĝi al datoj.

KOLHAAS Ĝi konformiĝu al sia propra forto. Doktoro Luther povus najlpendigi siajn naŭdekkvin punktojn ankaŭ pli frue en Vitenbergo. Per indulgencoj oni ja same komercis antaŭ 1517. Wesel mokis la papon simio, vestita en purpuro jam cent jarojn pli frue, el liaj sakroj tamen ne fontis reformacio. Devis okazi la granda kermeso kaj la porkaĵoj de Tetzel en Saksio. Devis alveni la ŝanco! La eblo. Kaj tiam li ne fiaskis, ĉar li ekparolis ĝustatempe. Kiu gardas sian buŝon, tiu gardas sian animon; kiu tro malfermas sian buŝon, tiu pereas. Memoru la sentencon de Salomono.

NAGELSCHMIDT Espero prokrastata dolorigas la koron. Same de tie.

KOLHAAS Tamen kiel Münzer povis imagi al si, ke la mondo renverseblas ĉiun duan tagon? Ĉu li ne estus devinta prefere zorgi, por plisolidigi unue la venkon de Luther? Luther neniam malestimis la kamparanojn; por kiuj li ja tradukis la Biblion nacilingven, se ne por la kamparanoj? Eĉ kiam li turnis sin kontraŭ ili, li defendis iliajn interesojn, nian reformitan kredon. Se tiam Luther — male al Münzer — ne gajnus al si la apogon de la feŭdularo, ĉi tiu deviĝus apogi sin sur la armefortoj de la papo kaj nia nacia afero estus definitive perdita. Tiukaze vi nun sidus en la prizono de la papistoj.

NAGELSCHMIDT Estas liberaj, kiuj sidas en malliberejo. Ĉar ili faris, kion ili devis fari. Ni estas sklavoj, Mikelo: sklavoj de la malbona konscienco. Dum la ekzekutistoj konfesigis mian fraton per ardaj tenajloj, li memorigadis pri mi siajn ekzekutistojn, ke ili baldaŭ ekkonos mian venĝon. Kvankam mi povas fari nenion. Mi havas nek monon, nek armitojn; tre bone, se foj-foje mi povas frapfermi la buŝon

al kelkaj sinjoraj spurhundoj, kastelkomandantoj ...

KOLHAAS Vi devas kvietiĝi, Karolo. Elinjo!

(Elinjo venas kun Henriko ĉirkaŭ okjara.)

ELINJO Mikelo!

HENRIKO Patro!

KOLHAAS Karaj miaj! Jen, kiom vi kreskis, Henriko!

HENRIKO Kion vi portis al mi el la foiro?

KOLHAAS Tuj ... Se vi fermos la okulojn.

ELINJO Ankaŭ en la preĝejo li senĉese demandadis: kion patro portis el la foiro? Nu, fermu la okulojn!

KOLHAAS *(Enportas la lignan ĉevaleton, lasitan en la antaŭĉambro, sidigas Henrikon sur ĝin.)* Nu, galopo!

ELINJO Hip-hop, ne foras Berlino ...

HENRIKO Haku, strangolu, piku ...

ELINJO *(ŝtopante mane la buŝon al Henriko)* Tion ne ... Ni ne hakas.

KOLHAAS Ni ne glavas.

ELINJO Estas la fabelo de onklo Nagelschmidt. Li nur ne havas ĉevalon por tio ...

NAGELSCHMIDT Ne. Sed mi havos. *(Ekiras.)*

ELINJO Restu ankoraŭ, Karolo! Tagmanĝu kun ni!

NAGELSCHMIDT El tio ree rezultos disputo. De Maria mi jam ricevis mian porcion. *(Ridas.)*

ELINJO Pro la dimanĉo mi ne permesas disputon. Vi ambaŭ silentos.

KOLHAAS Mi promesas ...

NAGELSCHMIDT Ankaŭ mi.

KOLHAAS Jen kion mi portis al vi, Elinjo.

(Pendigas ujeton kun arĝenta ĉeno ĉirkaŭ la kolon de Elinjo.)

ELINJO Amuleto! Arĝenta amuleto! Mi dankas. Kiel ĝi malfermiĝas? En ĝi loĝas fortuno. Mi ne povas malfermi ĝin.

KOLHAAS Atendu, mi montros ... Sed divenu, kio enestas!

ELINJO Ĉu ne fortuno!

KOLHAAS Ankaŭ. Sed por la okuloj ...

ELINJO Por la okuloj ... kio enestas?

KOLHAAS Armeo. Mia armeo.

NAGELSCHMIDT Ĉu armita?

KOLHAAS Anĝela. *(Malfermas, rigardas ĝin.)* Mia unupersona anĝela armeo.

NAGELSCHMIDT Nu, per ĝi ne multe ni akiros.

KOLHAAS Nur per ĝi ni multe akiros. *(mediteme)* Post Dio sole per ĝi. *(Turnas la ujeton al Elinjo.)*

(Elinjo rigardas ĝin senvorte, dume aŭdiĝas la voĉo de Maria el la kuirejo.)

MARIA Nagelschmidt, rajdsoldulo!

(Nagelschmidt elpaŝas kolerimpulse, post li la infano scivole.)

ELINJO *(post longa silento)* Kiu pentris min tiel bela?

KOLHAAS Majstro el Dresdeno. Ĉu ĝi plaĉas?

ELINJO Bela, pli bela ol mi.

KOLHAAS Nur pala reprodukto de la vera.

ELINJO Kiel li faris ĝin? Neniam li vidis min.

KOLHAAS Ĉu ne sufiĉas, se vidas vin mi?

ELINJO Al mi certe. Al la majstro malmulte.

KOLHAAS Mi diktis al li viajn trajtojn. Diktis sub plumon ... pli ĝuste sub penikon.

ELINJO Ne ruzumu! Blonda, dudeksesjara. Ĝeneralaĵoj.

KOLHAAS Ho, ne tion mi diris, Mi diris: Elinjo ... ŝiaj okuloj estas kolomboj, malantaŭ ŝia vualo ...

ELINJO Mi eĉ ne portas vualon ...

KOLHAAS Ŝiaj okuloj estas kiel kolomboj ĉe la akvofluoj ...

ELINJO Tuta nesto da kolomboj.

KOLHAAS Ankaŭ aliformaj, mi diris. Ŝiaj okuloj estas kiel la lagetoj en Ĥeŝbon, ĉe la multpopola pordego. Ŝiaj haroj estas kiel aro da kaprinoj, deirantaj sur la deklivo de la monto Gilead. Ŝiaj dentoj estas aro da ŝafinoj, kiuj elvenas al la lavejo; ĉiuj estas en paroj, kaj ne mankas eĉ unu el ili. Kaj la kapo, la formo de ŝia kapo estas simila al Karmel, ŝia vizaĝo aspektas kiel la matenruĝo, estas bela kiel la luno, hela kiel la suno, ĝi nur ne afliktiĝu: tiam ja estas terura kiel batalantaj taĉmentoj ... *(Ili ridas.)*

ELINJO *(kun ludata koketemo)* Kaj plu? Ŝia kolo, ŝiaj ŝultroj, ŝia staturo?

KOLHAAS Poste mi tiel parolis: Kiel belaj estas ŝiaj paŝoj en sandaloj, ho filino de princo! La svingado de viaj femuroj estas kiel ĉenringoj ...

ELINJO Ĉu tiuj de la majstro aŭ de Ŝulamit?

KOLHAAS Viaj du mamoj estas kiel du cervidoj, ĝemeloj de gazelino ... kaj via staturo similas la palmotrunkon ...

ELINJO Vi multe transsaltis kaj ion vi ellasis ...

KOLHAAS Kaj via palato kiel vino bongusta, kiu en-

glitiĝas ĉarmege kaj glate, kiu paroligas la lipojn de la dormantoj ...

ELINJO Pro la ellasoj reĝo Salomono nun prirespondigus vin ...

KOLHAAS Viaj lipoj estas kiel ruĝa fadeno kaj via elparolado estas bela kiel peco de granato ...

ELINJO Vi denove saltis ... Via umbiliko ...

KOLHAAS Via umbiliko estas kiel ronda pokalo ... via ventro estas kiel amaso da tritiko ĉirkaŭita de rozoj ...

ELINJO Atentu, la daŭrigo konvenas prefere al vi: via nazo estas kiel la turo de Lebanon rigardanta Damaskon ... Jen kion mi diros, se iufoje mi mendos bildon pri vi. Mia amato estas blanka kaj ruĝa, distinginda inter dekmiloj.

KOLHAAS Lia kapo ...

ELINJO ... estas kiel elektita, multekosta, pura oro, liaj haroj estas buklitaj, nigraj kiel korvo ... liaj vangoj estas kiel bedoj de aromaĵoj kreskigantaj bonodorajn plantojn ... Kaj kiel plu?

KOLHAAS Nin ambaŭ trafas: Konservu min kiel sigelon en via koro, kiel sigelon sur via brako; ĉar la amo estas forta kiel la morto, la ĵaluzo estas nefleksebla kiel Ŝeol, ĝiaj brulaĵoj estas Brulaĵoj de fajro, la flamo de la Eternulo ...

ELINJO Forkuru, ho mia amato kaj similiĝu al gazelo aŭ al cervo sur la montoj de aromaĵoj ... forkuru, mia Mikelo kaj rigardu, kio okazis al Nagelschmidt.

(Ili longe ridas. Kolhaas liberigas sin el ŝia brakumo kaj estas elironta. En ĉi tiu momento komenciĝas ekstere senindulga frapbruado, laŭta intervoĉado. Oni frapas sur pordo kaj fenestro. Unue Maria enkuras terurite kun la infano, poste Nagelschmidt kun ia fusilo.)

MARIA Ho Dio! La tribunalaj servistoj.

HENRIKO Paĉjo, la tribunalaj servistoj. Batu, haku ilin ...

KOLHAAS Ni ne batas, ni ne hakas. Maria, elkonduku la infanon!

MARIA Venu, anĝeleto! Venu, nu preĝu!

ELINJO Malfermu! Oni enrompos la pordon.

NAGELSCHMIDT Enrompos mi ilian porkomuzelon ...

KOLHAAS Kion ili povas celi? *(Malfermas la pordon.)*

NAGELSCHMIDT *(Kaptas ĉebruste la doganiston, malantaŭ kiu staras du armitaj solduloj.)* Kiel vi aŭdacas ... En domon de honestulo, kiel vi aŭdacas tiel enrompi, vi latrono!

DOGANISTO Barono Venceslao de Tronka ... Formetu la manon de sur mi ...

KOLHAAS Nagelschmidt!

ELINJO Karolo!

DOGANISTO Mi estas komisiito de barono Venceslao de Tronka. Formetu la manon!

NAGELSCHMIDT Kune kun via vangosako, vi hamstrovizaĝa!

DOGANISTO La soldato pafos ...

KOLHAAS Nagelschmidt!

ELINJO Karolo, kvietiĝu!

KOLHAAS La komisiita moŝto bonvolu enveni.

DOGANISTO Ĉu vi aŭdas, kio estas respekta tono?

NAGELSCHMIDT Kaj la frapego sur la pordo?

DOGANISTO Ĉu mi estus hamstrovizaĝa?

NAGELSCHMIDT Plej certe.

DOGANISTO Sed vi aspektas tia Münzer-vizaĝa, kio ne tre modas ... Münzer-muzelo ... Dözsa-muzelo ...

NAGELSCHMIDT Lasu la mortintojn, vi vermo!

DOGANISTO ... tia kostumo ne rekomendindas.

NAGELSCHMIDT Dankon por la takso. De soriko ...

KOLHAAS Nagelschmidt! ...

NAGELSCHMIDT Mi finis. Bela afero flanke de putoro.

DOGANISTO Ĉu mi havas la honoron renkonti sinjoron Kolhaas?

KOLHAAS Mi staras je via dispono.

DOGANISTO Kiel mi diris al ĉi tiu ... *(Montras fingre al Nagelschmidt.)* mi estas la nova doganisto de lia barona moŝto Venceslao de Tronka. Pardonu pro la malpacienco!

KOLHAAS Certe vi havis kaŭzon por ĝi.

DOGANISTO Mia komisio urĝas.

KOLHAAS Kaj kio ĝi estus?

DOGANISTO La pasletero.

KOLHAAS Kia pasletero?

NAGELSCHMIDT Kiu jukas ĝuste en mia manoplato.

DOGANISTO Sinjoro Kolhaas, mi petas vin. Se lin senĉese jukas la mano, mi ne povas paroli.

NAGELSCHMIDT Ne nur la mano: ankaŭ la piedo jukas.

DOGANISTO Jen vidu ...

KOLHAAS La sinjoro doganisto havas komision, ni lasu lin plenumi ĝin! Do, kia pasletero?

DOGANISTO Rilata al ĉevaloj ... Certa servisto Herse de via moŝto troviĝas tie.

KOLHAAS Kie tie?

DOGANISTO En la kastelo de Tronka. Retenita. Li estis veninta kun du nigraj ĉevaloj el Lejpcigo. Ĉevaloj kun sonoriletoj.

KOLHAAS Ĝuste.

DOGANISTO Li ne havas pasleteron.

KOLHAAS Kiu ĝin postulas?

DOGANISTO Lia barona moŝto Venceslao. Antaŭ nelonge li ricevis ĉi tiun privilegion.

(Dume Elinjo elserĉas paperojn el kesteto, transdonas ilin al Kolhaas.)

KOLHAAS Pri tio jam temis ankaŭ pasintmonate. La notariejo de Dresdeno deklaris: laŭ niaj leĝoj la kastelmastro de Tronkenburg rajtas postuli pasleteron de neniu persono honeste komercanta.

DOGANISTO Tio vere ĝustas.

KOLHAAS Do?

DOGANISTO Laŭ mia eksterofica konvinkiĝo mi mem diras: li ne rajtas postuli ion tian. Ankaŭ mia patro estas ĉevalkomercisto.

NAGELSCHMIDT Ankaŭ lia patro. Ke lian patrinon ...

DOGANISTO Bedaŭrinde mi enoficas. Ankaŭ mia opinio laŭoficas. Se mankas pasletero: ambaŭ nigraj ĉevaloj restos transbariere, konfiskitaj.

ELINJO Kontraŭjure. Vi ne rajtas fari tion.

KOLHAAS Trankviliĝu, kara! La sinjoro doganisto ne kulpas prie ...

DOGANISTO Bedaŭrinde.

NAGELSCHMIDT Bedaŭrinde. Li eĉ bedaŭras vin. Pro nura bedaŭro li enrompas la pordon. El ofica konvinkiĝo. Ke la Dio de la larmanta ekzekutisto! Dio mia, kiam vi pendumos la larmantajn ekzekutistojn?! Honestajn ekzekutistojn sendu al ni, Sinjoro ...

KOLHAAS Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio!

NAGELSCHMIDT Tiam benu min, Sinjoro, per la trankvilo de Kolhaas!

DOGANISTO Ĉu vi bonvolas vidi, kiel ventkapa li estas? Mi petas la pasleteron, via moŝto, aŭ la elaĉeton, kontante kvindek groŝojn. Alie la ĉevaloj restos retenitaj. Tiuj belegaj ĉevaloj.

KOLHAAS Sed tion mi ja ne lasos ...

NAGELSCHMIDT Finfine!

ELINJO Jen la mono. Lasu iri tiun malfeliĉan servisto n! Ekde semajno li jam survojas.

DOGANISTO Estas tubero en la afero, sinjorino: ankaŭ la servisto estas ja tiel Münzer-pasia. Pugne li ĵetis sin sur la armitan gardiston.

ELINJO Ĉu oni ne traktis lin krude?

KOLHAAS Rapidu, sinjoro, kun via mono! Liberigu la malfeliĉan Herse! Ĉi tiujn dudek groŝojn

transdonu al li, li jam certe konsumis la vojprovizon. Li konduku la ĉevalojn unue ĉi tien. Mi volas vidi ilin.

DOGANISTO Mi diros, sinjoro. Dio restu kun ĉi tiu domo!

NAGELSCHMIDT Nu jes. Li ja kuniras viaspecajn.

DOGANISTO Ĉu vi bonvolas vidi? Li rekomencas.

KOLHAAS Dio vin benu!

NAGELSCHMIDT Kio? Mia botopinto! La pugaĉon de la mizerulo! Kie lia ofica konvinko sidas.

DOGANISTO *(lerte elsaltinte tra la pordo antaŭ la piedfrapo)* Ĝis repiedbato! *(For)*

NAGELSCHMIDT Talpogrilo! Vidu, kure li reakiras sian kuraĝon.

ELINJO Kvietiĝu, Karolo! Hodiaŭ nenio fareblas pere de kuraĝo. *(Eniras la kuirejon.)*

KOLHAAS *(post longa silento)* Prave. Nenio fareblas pere de kuraĝo ...

NAGELSCHMIDT Kuŝas en la naturo de la kuraĝo, ke ĝi ĉiam trovas frapindan doganistan vangon. Kien ajn oni turnas sin: nuraj frapjukaj, malamuzaj muzeloj alrikanas. Kaj ĉiuj, sen escepto kantas pri leĝoj.

KOLHAAS Tiuj kantas pri leĝoj: ni validigas ilin. En viaj sangonebulaj rigardoj ĝuste niaj rajtoj turniĝas kontraŭ ni.

NAGELSCHMIDT Ĉu niaj rajtoj?

KOLHAAS Niaj rajtoj! Ĉu la Dresdena ĉefnotario sucis siajn vortojn el la fingro? La princo elektisto, vi bone scias: estas partiano de la leĝa ordo. Vi ne scias, ĉar ...

NAGELSCHMIDT ... Ĉar per unu mano li donas leĝon kaj per la alia piedo li distretas ĝin. Piedfrapas ĝin en ĉiu tago, en ĉiu horo kaj en ĉiu minuto. Tiu fama leĝdona mano egalas al: servista mano. Servas al imperiestraj interesoj kaj frapantaj piedoj. Latronoj de Tronka.

KOLHAAS Venceslao de Tronka eĉ image ne egalas registaron, nek imperian asembleon. La princo elektisto volas rekvietiĝon ...

NAGELSCHMIDT Rekvietiĝon!

KOLHAAS Finiĝu tiuj multaj arbarbruloj. Ankaŭ Münzer devus tiutempe konsciiĝi pri tio. Li elbatalis por si kvindekmil pendumilojn. La animo de via propra frato sidas en la ĉielo. Kiun li elaĉetis per tio?

NAGELSCHMIDT Sin mem.

KOLHAAS Kristo elaĉetis nin ĉiujn.

NAGELSCHMIDT Ne egalmezure.

KOLHAAS Vi kriadis "egaleco". Oni egaligis vian domon kun la tersurfaco. Nun vi volus kompreneble: ĉiuj kunhavu vian ofendon. Vi estas egoisto, Karolo, la homoj jam senspiriĝis en la religiaj disputoj, ribeloj kaj sepultado de mortintoj. Ili volas vivi: labori, eduki infanojn, viziti foirojn; post tiom da tumultoj repreni spiron, anstataŭ armilojn, forĝi dompordojn ... fenestrokradojn. Trasidi almenaŭ unu Kristnaskon pace. Vidu, apenaŭ ni reformis nian kredon, jam novaj reformatoroj leviĝas, libertinoj kaj rebaptistoj, kia paco do kreskos el tio?

NAGELSCHMIDT Ne supozu, ke mi venis por enkonduki pacon sur la teron; mi venis por enkonduki ne pacon, sed glavon ...

KOLHAAS Jes. Diris Kristo. Sed Nagelschmidt ne konfuzu sin kun la filo de Dio. Remetu vian glavon; ĉar ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo pereos. Ankaŭ tion diris Li. Ĉu mi povas peti ion de vi? Domaĝu, se eblas, la bonan famon de mia domo! Vi frapas la flankon al tribunala servisto; nature, vi fuĝas al mi. Ne miskomprenu min: venu kiel en propran hej-

mon. Sed ĉiu tribunala servisto frapita surbuŝe rakontas al sia estro: la amiko de Mikelo Kolhaas faris tion. Vin oni persekutas kaj al mi kaj miaj ĉevaloj venĝos sin. Lastan fojon iu bruligis la orelojn de la stelfrunta beja ĉevalo. Vi ĉikanis baronon Günther, kaj ĉi tiu amikas kun Venceslao.

NAGELSCHMIDT Sekve pro mi vi pagis ankaŭ la pasmonon ...

KOLHAAS Mi ne povas scii ...

NAGELSCHMIDT Tiukaze mi repagos la punon. Jen kvindek groŝoj.

KOLHAAS Mi ne volis ofendi vin.

NAGELSCHMIDT Mi ne volis damaĝi vin.

KOLHAAS Karolo, mi petas vin per Dio: ne mistordu la sencon de miaj vortoj. Mi levis la voĉon en intereso de ni ambaŭ, por la trankvilo de Elinjo kaj mia filo. Kial vi vundas min per tio, ke mi viasupoze domaĝas kvindek mizerajn groŝojn?

NAGELSCHMIDT Vi timas perdi vian kvindekgroŝan trankvilon.

KOLHAAS Ĉu por tiom vi taksas miajn principojn?

NAGELSCHMIDT Por tiom taksis tiuj el Tronka ...

KOLHAAS *(eksplode)* Sufiĉas! Nun jam sufiĉu, Karolo! Se ne aliloke: en nia interrilato ĉesigu la leĝorompon! Ĉesigu la leĝotreton!

NAGELSCHMIDT *(ride)* Ĉu mi?! Nagelschmidt, la leĝorompulo, la leĝotretulo!

KOLHAAS Estas mia laŭleĝa rajto, ke vi ne ofendu min en mia honoro! De Dio ricevita rajto mia estas ŝirmi eĉ kontraŭ vi la trankvilon de mia familio. Ĉu vi konsideras min solulo? Ĉu vi pensas: mortintoj vivas ĉi tie kun mi? Fantomoj?

NAGELSCHMIDT Dio! Vi revenigis lian voĉon!

KOLHAAS Vi povas havi cent vivojn, riski ĉiujn cent en ĉiuj minutoj; sed konsciigu al vi, Elinjo kaj tiu senkulpa infano havas nur unusolan vivon; antaŭ Dio mi ŝuldas respondecon por ili. Aŭ la Di-Sinjoro konfidis ilin al vi?

NAGELSCHMIDT Ĉefanĝela alvoko!

KOLHAAS Se tio estas por vi kvindekgroŝa honoro ...

NAGELSCHMIDT Mi diris: trankvilo.

KOLHAAS Indiferente! Se kvindekgroŝa: estu do tia. Kaj kiomas la via? La sorton de kiom da animoj vi portadas? Katenojn surmetitajn de kiom da kreitoj perdutaj sen vi? Ĉiutage vi povos

riski vian haŭton; vi estas libera — en la senrespondeco. En la kurado kontraŭmuren!

NAGELSCHMIDT Kaj ankoraŭ en kio?

KOLHAAS En lasi vin buĉi! Lasi vin suprentiri sur pendumilo! Lasi vin radumi! Sed nur vin mem! Ne ludu je la vivo de aliuloj! Tiu bandito nomis vin Münzer-vizaĝa. Münzer-pasia vi estas, jen la tubero en la afero. Per nura pasio nenio akireblas.

NAGELSCHMIDT Nek per preĝo!

KOLHAAS Ne per preĝo. Nek per via venĝsoifo. Haku, piku, tranĉu! Tiel vi gurdas al aliuloj, ja eĉ al mia filo! Al sensciulo! Haku, piku! Ja tiel via Münzer: ni lasu kuri la popolon al sia certo — sia perdo: al paradizo de senrespondecaj promesoj. Ĉar ĝi malestimas, ĉu ne, la kvindekgroŝan trankvilon. Ĉar ĝi preferas, ĉu ne, esti palisumata kaj ke la superforto sternu ĝiajn intestojn sur bariloj! La superforto, Nagelschmidt! La subtaksita kontraŭulo kaj la stulteco. Ne tuŝu vian malamikon, dum vi ne certas, ke vi povas senkapigi lin! De-kiama estas ĉi tiu averto? Al kiuj ĝi parolas, se ne al stultuloj, aventuristoj, falintaj en mili-

taj sciencoj kaj aritmetiko: doganistoj de la facilkredemo.

NAGELSCHMIDT Tiel mi amas vin! Pli laŭte per tiu voĉo!

KOLHAAS Ne moku! Dekmiloj da orfoj kaj vidvinoj priploras la falintan facilkredemon. Notu al vi, Nagelschmidt: kiu incitas ribelon kaj ne venkigas ĝin: estas masakrulo.

NAGELSCHMIDT *(ĉi-foje ankaŭ li ekster si)* Vi mensogas! *(Elinjo enpaŝas.)*

KOLHAAS Ĉu mi mensogas? Al tio ĉi mi povas respondi nur per glavo ... for de ĉi tie! For el mia domo!

ELINJO Mikelo! Kio okazas? Karolo, per amo de Dio ...

NAGELSCHMIDT Promenas lia menso.

ELINJO Ĉu neniam finiĝos ĉi tiu disputo! Kion vi atendas de la barono de Tronka, se tiel aĉe vi mordas unu la alian? Mikelo, kara, reprudentiĝu! Tiel sangoŝaŭma neniam mi vidis vin. Glason da akvo ... Sedativon ... *(For)*

NAGELSCHMIDT Pardonu min, Mikelo.

KOLHAAS Vi bone scias, Karolo, Münzer mi kritikas, sed ne akuzas. Kvankam ploras mia koro. Vi ja mem povis vidi vojaĝante al Lejpcigo kaj eĉ pli preter Frankenhausen la larmokulajn

postrestintojn de murditaj kamparanoj. Onidire, sur la batalkampo eĉ nun amase vagadas virinoj, infanoj ...

(Elinjo envenas kun glaso da akvo, metas ĝin senvorte antaŭ Kolhaas.)

KOLHAAS ... plorante kolektas bagatelajn memoraĵojn de la falintoj ... Bone vi scias, ja ankaŭ via frato ĉeestis. Ĉu vi ankoraŭ memoras la raporton de Melanchton? Kaj la malfeliĉuloj nur restis starantaj kaj kantadis. Ni petas vin, ho Sankta Spirito! Kvazaŭ freneziĝintaj, ili nek defendis sin, nek forkuris. La princaj taĉmentoj forhakis sesmil el okmil. Münzer certigadis al ili: ne timu, Li ŝirmkaptos ja ĉiujn kuglojn, Dio ja tiel promesis. Kvankam Dio promesis al neniu ion tian.

NAGELSCHMIDT *(Nur geste indikas, ke Melanchton diris ne la veron, poste)* Kaj kio farendas ĉi-kaze?

KOLHAAS Restas la vojo de la leĝo, la Sankteco de la Leĝo. Ni tenu nin al la proklamitaj leĝoj: ankaŭ tio sufiĉas kiel delikto.

(Bojado defore, poste sonorileta sono: laŭritme de tirpaŝoj sonas du sonorileto j. Kolhaas kaj Elinjo rapidas alfenestre. Ŝultrofale Nagelschmidt restas sidanta.)

ELINJO Herse! Li alvenis ...

KOLHAAS Kun miaj ebonaj selĉevaloj pakitaj en vato. Ni rigardos la ĉevalojn, Karolo, ĉu?

ELINJO Maria! Jen via filo, Maria!

(Herse enpaŝas, duone mortbatita, kun la sonoriletoj de la ĉevaloj enmane.)

ELINJO Sankta ĉielo! Maria!

MARIA *(enkuras eksplode)* Herse! Kio al vi, filo mia? Ĉu vi mutiĝis? Mutiĝis aŭ ebriiĝis?

NAGELSCHMIDT Ambaŭ ...

ELINJO Plena de koto! Plena de sangobluoj.

KOLHAAS La ĉevaloj, kie ili restas? Kie vi lasis la ĉevalojn?

MARIA Kvazaŭ el inter porkoj leviĝinta ... parolu, kio okazis al vi? Ĉu mi demetu al vi la jakon ... Sidiĝu, malfeliĉa. Li ŝanceliĝas ... Bonvolu ne koleri lin, via moŝto. Vi bonvolas lin koni ... Li ne kutimas fari ion tian ... Herse ... Filo Herse!

KOLHAAS Kie restas la ĉevaloj? Mi konfidis al vi la ĉevalojn. Kial vi deprenis la sonoriletojn?

ELINJO Trinku iom da teo, mia filo!

MARIA Peston, ne teon. Kial vi ne respondas al lia moŝto? Kie oni drinkigis vin, Dia plago? Via

moŝto bonvolu ne koleri lin. Vi bonvolas scii, meminiciate li neniam drinkas. *(Frotas la kapon al Herse.)* Lia kapo plenas de lezoj, sinjorina moŝto. De kie tiom da lezoj sur via kapo, he, filo? De drinkaĵo ne eblas. Diru, ĉu vi falis el la selo?

KOLHAAS Elrigardu, Karolo, ĉu la ĉevaloj ne staras en la korto?

NAGELSCHMIDT Se ili ne glitis tra lia gorĝo, ili troviĝas ie. *(For)*

ELINJO Ni kuŝigu lin! Humidan kompreson sur lin, Maria.

MARIA Nu venu, fileto. Tian honton sur nia senkulpa kapo ...

KOLHAAS Kie vi lasis la ĉevalojn, Herse?

MARIA Morgaŭ li diros, via moŝto. Li fariĝis tre vortŝpara. Ĉu vi ne mutiĝis? La ĉevalojn! Kio okazis? Respondu al lia moŝto!

HERSE Mi ... trabatita.

MARIA Trabatita. Vi ne mutiĝis. Vi nur lasas pendi la kapon. *(Frapetas al li la vangojn, poste ekkolere vangofrapas lin.)* Rekonsciiĝu! Sankta Maria en la ĉielo! Via moŝto ... Sinjorina moŝto ... Bonvolu alrigardi! Sango fluas el lia buŝo ... El liaj pulmoj ... Filo amata!

KOLHAAS Mi vokas la kuraciston. Elinjo ... prizorgu ... li kuŝu senmova ...

MARIA Filo Herse ... Filo amata ...

KURTENO

DUA AKTO

UNUA BILDO

Scenejo: sama kiel en la unua akto. Elinjo vojpreparas sin. Henriko sur sia lulĉevalo. Somera tago. Pordo malfermita.

HENRIKO Haku! Haku!

ELINJO Ni ne hakas.

HENRIKO Strangolu!

ELINJO Ni ne strangolas.

HENRIKO Strangolu! Piku!

ELINJO Kiomfoje ripeti al vi, Henriko? Jam ĉesu strangolumi! Elseliĝu, iru preni interman-ĝon.

HENRIKO Panjo! Vi kien?

ELINJO Mi foriros, sed baldaŭ mi revenos.

HENRIKO Baldaŭ? De kie?

ELINJO De ĉi-nefore. Mi hejmenkondukos la ĉeva-lojn de via patro.

HENRIKO Ĉu patro ne povas rekonduki ilin?

ELINJO Li havas aliajn farendojn.

HENRIKO Al mi kion vi portos?

ELINJO Kion vi petis. Sonorileton por sur la kolo de via ĉevalo. Iru, fileto, manĝi!

HENRIKO Kunportu min, panjo ...

ELINJO Kien kunporti vin? Kien vi ŝatus?

HENRIKO Nenien, nenien! Vi nur kunportu min!

ELINJO Ho, neeble. Rajdistoj tie tre galopas. Jen kiel nun ĉi tie.

(Defore krioj, huffrapado, poste Nagelschmidt ensaltas tra la pordo kaj de tie rekte malantaŭ la lavniĉon.)

HENRIKO Karolo ...

ELINJO Ĉit!

KASTELSOLDULO *(En.)* Pardonon, sinjorina moŝto ...

ELINJO Nenia pardono. Kiel vi aŭdacas tiel rompenveni?

KASTELSOLDULO Ĉevalŝtelisto ...

ELINJO Nenia ĉevalŝtelisto! En domo de nobelo ne serĉu ĉevalŝteliston!

HENRIKO Haku ... *(Elinjo ŝtopas al li la buŝon.)*

ELINJO Ne ĝenu la interparolon!

KASTELSOLDULO Haku ... Do ankaŭ la infano ...

ELINJO La servistoj ekstere hakas rapon. De ili li lernis.

KASTELSOLDULO Hm.

ELINJO Sed se vi volas havi ankaŭ vian kapon miksita furaĝe inter rapoj, trankvile ĝisatendu mian edzon.

KASTELSOLDULO Mian saluton al lia moŝto. *(Rapide for.)*

NAGELSCHMIDT *(Ridante aperas.)* Bone vi timigis lin, Elinjo. Se li scius, ke Mikelo reĵetus sur lin nur panon. Ne koleru. Mi promesas: mi ne plu faras leĝon por mi. Ĉi tiu estis mia lasta indigno.

ELINJO Kion vi refoje fifaris?

NAGELSCHMIDT Certaj moŝtaj personoj, ĉu ne, deŝiradis la ĉemizon, pantalonon de Herse. Tramordadis liajn gantojn, duone konsumis liajn orelojn. Kaj mi venenis ilin.

ELINJO Nu ne ...

NAGELSCHMIDT Ok kadavroj ... ok kaj duono, ĉar unu fortrenis sin.

ELINJO Jesuo!

NAGELSCHMIDT Aŭskultu ja, kia silento ekregis ĉirkaŭ la kastelo! Nek bojado, nek hojlado. La hundaro transdormiĝis en pli noblan eston. Kiel kvietas, ĉu ne, la atmosfero? *(Hundo hojlas.)*

ELINJO Anstataŭ hundo Dio donas hundon.

NAGELSCHMIDT Ĉi tiu estas la duonmorta. Restis nur kvindekprocenta hundo. Min ĝi malbenadas. Rajte de la lasta hojlo.

ELINJO Kaj miaflanke la lasta averto, Karolo ...

NAGELSCHMIDT Mi ĵuras, ekde hodiaŭ nur la leĝo ... Kion Lia Sankteco La Leĝo diras.

HENRIKO Kiu leĝo? Kie la leĝo loĝas?

NAGELSCHMIDT Ĉu Lia Sankteco La Leĝo? Ĉu onklo Leĝo? Mi klarigos.

ELINJO *(Prenas la infanon en la sinon kaj elirante)* Ni ne edukas banditon el la infano.

NAGELSCHMIDT Banditon. Por eviti kulpojn li ja bezonas scii: onklo Leĝo egalas al la imperiestro, la princo elektisto, Venceslao de Tronka kaj la kancelario. Onklo Leĝo reguligas la konduton, la laboron, la amon, en Ĝenevo — kiel ni aŭdis — la jupolongon kaj la virtojn fermigante en turon la malĉastajn virinojn; onklo Leĝo zorgas, ke ni observu la fastotagojn, liveru vinon, tritikon, kokinojn, porkojn kaj iufoje niajn filinojn al la bienulo; kiajn skulptitajn bildojn ni rajtas teni en nia domo, kion ni sonĝu, kion ni legu, pri kio kiamaniere ni opiniu ... Unuvorte, onklo Leĝo trančas al ni

la padon, sur kiu ni pasu. Sur ĝi li bastonpelas nin al la paradizo.

ELINJO *(aŭskultinta el la pordoframo)* Ĉiu vorto via estas regulrompo. Se kun vi mi iros al Berlino, la princa korpogardo arestos vin.

NAGELSCHMIDT Mi restos muta.

ELINJO Via hundvenena pasio estas ĉizita al vi sur la vizaĝo.

NAGELSCHMIDT Proksime al nia reganto mi alprenos mian plej mildan fizionomion. Mi kondutos laŭeble plej fie: pie kaj humile. Serioze mi preparas min por la vojo, Elinjo. Anstataŭ skermado mi ekzercis min ankaŭ hodiaŭ en la fideleco al la imperiestro.

ELINJO Kvazaŭ ornamitan pordegon, propramane vi skulptas vian pendumilon. Kaj la kaleŝo ankoraŭ ne veturpretas.

NAGELSCHMIDT *(ekiras vigle eksteren, zumkantante)* Ĉar ne decas, nek necesas por montano simpla fost' ...

(Kolhaas venas kun Francisko Müller.)

KOLHAAS Elinjo! Nia savanto, sinjoro Francisko Müller, la plej dokta jurdoktoro de Brandenburgo ...

ELINJO Francisko!

MÜLLER Nu vidu! Elinjo ne ĉikanas, ĉar iam mi petis por ŝia mano. Mikelo senĉese sinjormüllerumas min.

ELINJO Certe tone de respekto.

KOLHAAS Kial ne respekti lin! La plej altan konsilanton de la princa kancelario, frekventantan eĉ la Berlinan kortegon ... Nian peticion formulos do li, Francisko.

MÜLLER Francisko formulos ĝin kaj sinjoro Müller kondukos Elinjon antaŭ la reganton.

ELINJO Eterne mi dankos vin, Francisko. Loku vin oportune kaj rakontu iom ... Dio mia ... kiom da jaroj ni ne vidis unu la alian?

MÜLLER Pasis precize ok jaroj, ekde kiam vi, kvankam afable kaj per molaj vortoj, tamen rifuzis min, ĉar — kiel dirite — ĉi tiu fripono estas reĝo Salomono ...

ELINJO Li estis por mi la Alta Kanto ...

MÜLLER ... la Alta Kanto Kaj sinjoro Müller, ej, sinjoro Müller: la obsedito de juraj sciencoj, de malvarmaj paragrafoj. Finfine, kiel vi ambaŭ scias, mi kunligis min kun la jurisprudenco. Sen virino, infano mia vivo dezertas, sed ... kiel diri ... libere mi juĝas nun pri tio, de kio mi iam estis obsedito. Lasu veni al mi la in-

fanojn, la venĝon, la ĵaluzon, la amon, lasu veni al mi la junulojn, la aĝulojn kaj la vidvinojn; la amon kaj la ŝtelitajn azenojn, la venĝon, la funebron, la marodistojn kaj envultistinojn, la falsajn profetojn, la persekutatojn kaj persekutantojn, la trompantojn kaj trompitojn, la sinjoron kaj lian serviston, edzon kaj amatinon, la nepagitan imposton kaj la neglektatan preĝon, la erarintan pastron kaj la vagantan hundon, ĉion, kio vivas, kio spiras, do pekas. Ĉar ne ekzistas pli falema estaĵo ol la homo. Juĝata laŭ nia nuna jurisdikcio: se li ekparolas, li kulpas per ĉiu sia centa ... centtria vorto kontraŭ iu leĝo. Kaj ĉu vi havas ideon pri tio, kion la homoj kunbabilas de mateno ĝis vespero? Kion kungestas surdmutuloj?

ELINJO Kaj kiu observas tion? Ke per ĉiu centa ... centtria ...?

MÜLLER Kiuj oficas tiucele. Ja.

ELINJO Terure.

MÜLLER Kiel senkulpigi la homon, se liaj kulpoj ne estas registritaj? La socio samas kiel ... anserhepato en fritpleto! Ne atentata, ĝi misbrulas.

ELINJO Lasu veni al mi ... Antaŭ tribunalon. La samon diras Nagelschmidt.

MÜLLER Kiu Nagelschmidt?

ELINJO Ho, nenio. Nur io venis al mi en la kapon. Vi ja havas enorman potencon en la mano!

MÜLLER Ja ne! Ankaŭ super mi staras iu kaj ĉi tiu diras: lasu veni al mi sinjoron Müller. Kaj iom de pli supre: lasu humilrampi al mi sinjoron Kallheim, kiu mem estas nur plilongigo de la plej supera mano. En kiun li, ni esperas, Elinjo povos meti la plendon de la brava ĉevalkomercisto. Nia amiko Mikelo malsereniĝis.

ELINJO Kio malbona, kara?

KOLHAAS Mi nur enpensiĝis. Kunkalkulis miajn kulpojn.

ELINJO Ĉu viajn kulpojn ... Diru, Francisko: kian sorton havos Mikelo, se viaj registristoj metos sub akuzon la tutan homaron, la tutan anserhepaton?

MÜLLER Absolvo, memkompreneble. Kun li ni rekomencos la Edenajn tagojn. Kaj mi, kiel Lucifero envios lin plu pro la beleco de Eva. *(Ili ridas.)*

ELINJO Por la komplimento mi portos ion por trinki. Kaj ensendos Herse por la peticio. *(For)*

MÜLLER El plendo ĝermas la vero. El la ovetoj de plendoj elkoviĝas la paseroj de la rekompenco. Do la afero komenciĝis tiel, ke barono Venceslao de Tronka retenis vian serviston kun la du nigraj ĉevaloj. *(Skribas.)*

KOLHAAS Kaj de tiam li vomas sangon.

MÜLLER Tion nur fine. La drama knalo konserviĝu por tiam. Ankaŭ la mizero, kiel en greka dramo, devas esti redaktata. Alimaniere ĝi restas senefika. Do oni postulis senrajte pasleteron de via servisto ... *(Herse envenas.)* ... kvankam la Dresdena ĉefnotariejo ... jes ... Kio poste okazis?

KOLHAAS Rakontu, Herse, kio poste okazis?

HERSE Ĉu post la draŝado?

MÜLLER Ankaŭ la draŝado restas por la fino.

HERSE Tuj ĉe la komenco mi ricevis ĝin.

MÜLLER Kiel la afero komenciĝis?

HERSE La kastelkomandanto demandas: de kie mi venas? Mi diras: mi iras hejmen.

MÜLLER Pro tia respondo ankaŭ mi igus vin draŝi. Diru precize: kial oni ĵetis la ĉevalojn en karceron, post kiam via mastro, sinjoro Kolhaas pagis la kvindek groŝojn al la doganisto?

HERSE Ĉu la ĉevalojn? En karceron? En stalon.

MÜLLER En karceron. La princo elektisto estas ŝateganto de ĉevaloj. Do ni devas igi lin ekdomaĝi la ĉevalojn. Ĉu oni batis la ĉevalojn?

HERSE Min oni batis!

MÜLLER Tio estas alia afero. Ĉu oni mistraktis la ĉevalojn?

HERSE Kontraŭe. Algalopis sinjorido Venceslao kaj lia amiko Günther. Kiom mi postulas por ili? Kvardek orguldenojn. Tro multas, ĉu ne? Mi montru la pasleteron. Mi ne havas ion tian. La doganisto forgalopis por la kvindek groŝoj. Tiam sinjorido Venceslao diras, ke mi ligu la ĉevalojn en la stalon. La stalo estis plena; mi do konduku ilin en la porkejon. Sed tien neniel mi povas konduki ilin. La porkejo ja svarmas de puloj. Ke mi tenu la buŝon. Mi tenos ĝin, sed la ĉevalojn ni ne mizerigos. Ili alte tenas la kapon, frakasiĝos en la porkejo. Kaj mi alte tenas la nazon, jen tiel parolas la kastelkomandanto, kaj donas kelkajn glavofrapojn sur mia dorso. Tio eksufiĉis al mi, kaj ek en la selon, rekte al la ĉefpordego. La kastelkomandanto ekfajfis, oni fermis la pordegon, du gardistoj depuŝis, piedtraktis min, unu tretis al mi sur la vent-

ron, aperis hundoj, ili tiris-ŝiris, tramordadis min, jen rigardu min, kaj por ne morti tie, en la korto, oni ĵetis min trans la barilon. Mi svenis. Kaj jen nun mi estas ĉi tie. *(Krie.)* Bonvolu alrigardi!

MÜLLER Dankon. Vi povas foriri.

HERSE Mi forgesis diri, ke mi ankaŭ strangolis du hundojn.

MÜLLER Tion ni ne emfazu.

KOLHAAS La princo elektisto ŝategas ankaŭ la hundojn.

HERSE Do preferindus, via moŝto, transbaptigi nin al hundoj. *(For)*

MÜLLER Kaj ĝuste li miras, se oni draŝas lin.

KOLHAAS Kaj ĉu vi ne miras?

MÜLLER Jam la miro mem egalas ian mildan specon de eksceso. Do la ĉevaloj restis tie.

KOLHAAS Skribe mi pruvis la malpravecon de la postulo de l' kastelmastro. Ĉi tiun parton de la proceso mi gajnis. Prezo de ses miaj ĉevaloj elspeziĝis por tio. La barona moŝto Venceslao igis min voki, por transpreni la du nigrajn ĉevalojn. El la porkejo.

MÜLLER *(Rapide skribas.)* El la porkejo ...

KOLHAAS Dum ses monatoj miaj du belegaj ĉevaloj laŭvorte nuliĝis. Mi ne povis transpreni tiujn du kotŝmiritajn ĉevalaĉojn kuntenatajn de nuraj ostoj kaj haŭto. Mia postulo en la dua parto de la proceso estis: estu redonita al mi, kio estis forprenita. En la Dresdena prokurejo oni dormigis mian apelacion en la tirkesto.

MÜLLER Ne dormigis. Oni false prijuĝis ĝin. La ofico, kara amiko, estas unueca, solidara familio. Ne konsilindas kalumnii eĉ unu membron de la familio. Do ...

KOLHAAS Oni dormigis ĝin!

MÜLLER ... sekve de falsa klasifikado ...

KOLHAAS Du parencoj de barono Venceslao intermikis sin en mian aferon. Sinjoro Hinz, la trinkverŝisto de la reganto kaj sinjoro Kunz, kortega ĉambristo. *(Ĉi tion Müller ne skribas. Ankaŭ poste: nur kion li konsideras ĝusta.)* Tiel okazis, ke la supera instanco resendis mian plendon por prijuĝo al tiu, kontraŭ kiu mi prezentis ĝin: al la kastelmastro de Tronka. Ĉi tiu formo de la leĝotreto nun jam ĝeneralas. Sekve de tio plendantoj, anstataŭ esti laŭleĝe defendataj, venas en la manojn de la

plenditoj: viktimoj al la pugnoj de la atencintoj. Ĉu estas vere, ke vi murdis ĉi tiun homon? Kalumnio, insinuo — krias la murdinto kaj oni frapas la buŝon al la kadavro.

MÜLLER Vi tro forvagis ...

KOLHAAS Kion asertas sinjoro Venceslao? Oni ne trabatis la serviston, sed dum la fuĝo li frakasiĝis. Miaj ĉevaloj estis bone tenataj, sed estante harfenda, mi lasis ilin al la furaĝado far la kastelmastro, tiel do mi ne postulaĉu. Kaj vidante tiom da mensogoj mi petis provincestran protekton en Brandenburgo, kanceliero Kallheim, la bofrato de la Tronkaano mesaĝis al mi: anstataŭ senutila procesado bazita sur falsaj akuzoj mi tuj transprenu miajn ĉevalojn, alie li igos min malliberigi pro ribeligo. Min, pri kies leĝrespekto kaj honesto, se necesas, atestos doktoro Luther? Mikelon Kolhaas en karceron? Nun mi jam trudiĝas, eĉ se ĝi daŭros ĝis vivofino, reiniciati la proceson. Mi daŭrigus ĝin eĉ, se temus ne pri du altvaloraj rajdĉevaloj, sed pri fava kataĉo.

MÜLLER Tio restu inter ni.

KOLHAAS Kio restu?

MÜLLER La kato. Ĉi tiu troigita pretendo de jurosento ĉe vi, simila al ora pesilo. Alivorte: la katideca naiveco.

KOLHAAS Jurosento ... ĉu naiveco?

MÜLLER Se vi pensas tiel, ke la vero estas tajlata laŭ ĉies korpa mezuro: tiam nepre. La vero de la leĝo estas ĝenerala, kaj bedaŭrinde: averaĝa. Kiel soldataj botetoj. Ĝia celo estas ne la vero de unuopulo, kiun cetere ĝi neniam povas malkovri, do ne la protektado de individuaj kaloj, sed la ŝirmado de la tuta korpo, de la Ordo, de la socia paco. *(Skribas.)* Petegante por pardono pro mia falema naturo, inklina al malordemo, koncipita en peko ...

KOLHAAS Mi ne inklinas al malordemo!

MÜLLER Tion malpravigas ja via levita voĉo.

KOLHAAS Mi petas ne pardonon! Mi postulas mian veron kaj punon de tiuj ...

MÜLLER Haltu, haltu! Ni komencis per humila peto, vi daŭrigas per postulo kaj kulminigas per puno vian petskribon. Via ofendo bagatelas; negrava skrapeto sur la pura vizaĝo de la vero, de la vero de la imperiestro — tiel ni formulos. Via postulo kompare al tio estas troigo, elvokanta do suspekton. En la loko

de la imperiestra prokuroro mi demandus: kio fakte nutras la emociiĝon de Mikelo Kolhaas, kia nekontento, se la motivo: kvindek groŝoj, portempa reteno de liaj du ĉevaloj estas finfine bagatela? Ĉu ĉi tiu pasieco de la jurosento ne kovras sekretan ribelon kontraŭ la ekzistanta reĝimo?

KOLHAAS Ĉu akuza parolo? Ĉu vi laŭtlegas la akuzan akton de la defendo?

MÜLLER Ne mi diras tion. Mi pensas per la kapo de la prokuroro.

KOLHAAS Se tiel facile vi interŝanĝas vian kapon kun tiu de la prokuroro, jam nun ni rezignu pri mia defendo. Ni ne daŭrigu. Per via menso lerta pri kontraŭaj konceptoj vi turnos finfine la ofendon kontraŭ mi.

MÜLLER Povus turni iu, se tiel li dezirus interpreti ĝin.

KOLHAAS Ĉu la skribita vorto ne plu havas sencon?

MÜLLER Nur sencinterpreton, kara amiko. La senco de niaj vortoj sidas en la kapoj de tiuj, kiuj ilin legas.

KOLHAAS Egalas do, kion ni skribas.

MÜLLER Se el nia petskribo klariĝos, ke via vero estas la vero de la reganto, via ofendo fariĝos lia ofendo; se konvinke ni malkovros, ke la mis-

ago de sinjoro Venceslao ĵetas ombron sur lian majeston, ni havos gajnitan aferon.

KOLHAAS Ĉu ni anoncu do al lia majesto, ke du liaj ĉevaloj estas ŝtelitaj, li estas punita per kvindek groŝoj, ke lia majesto estas draŝita, kaj sciiĝinte pri tio, mi, Mikelo Kolhaas protestas...

MÜLLER Ne moku, tiel eĉ paŝeton ni ne progresos.

KOLHAAS Nek per tio, ke mi dronos en flaton mian fidon al la reganto. Povas esti, ke vi pli bone scias, kiuj estas falsaj vojoj kaj kiuj kondukas al la vero; mi povas nur diri: malgraŭ Hinz, Kunz, Kallheim mi kredas je la leĝo, je la boneco kaj senpartieco de la reganto. *(Müller skribas.)* Se mi estas kolerimpulsa, klarigu tion per ĉi tiu mia kredo. Mi bezonas vin, ĉar mi ne volas propramane preskribi leĝon al mi mem. Sufiĉas al mi la plorinda ekzemplo de la Münzer-anoj. Mi volas vidi feliĉaj mian filon, mian edzinon, kaj mia tuta aspiro estas plezuriĝi pri miaj ĉevalidoj anstataŭ procesadi. Mi sentas min bone inter miaj fruktarboj kaj sur foirplacoj, kaj kune kun nia Sinjor' Kristo mi diras al la ofenditoj: petu, kaj estos donite al vi, serĉu kaj vi trovos, frapu kaj estos malfermite al vi.

MÜLLER Pli bele ankaŭ mi ne povus formuli. Jen ĉi tie kuŝas via vero, Mikelo, en la vortoj de Jesuo. *(Elinjo venas kun vinbotelo, glasoj.)* Elinjo, bela virino! Via edzo superis min en elokvento. Se min trafos missorto, lin mi petos por la plenda parolo.

ELINJO Li timigas siajn kontraŭulojn per sia mildo.

KOLHAAS *(verŝas)* Ni dankas al Francisko por la preĝsimila peticio.

ELINJO Kaj ke li venigos min antaŭ la vizaĝon de la reganto.

MÜLLER Ni renkontos nin ĉe la ĉefpordego de Berlino en la interkonsentita tempo. Nun mi devas for. Al Mikelo mi dankas por la devizo de mia tuta jura agado: frapu kaj estos malfermite al vi ... En paco kaj ĝojo ni revidu unu la alian! Frapu! *(For)*

KOLHAAS Dio benu vin!

ELINJO Dio benu vian moŝton! *(Pli malfrue.)* Kiam mi devos aperi?

KOLHAAS Sabate je la naŭa matene.

ELINJO Ĉu vere antaŭvizaĝe de la reganto?

KOLHAAS Eble eĉ la imperiestro ĉeestos. Aŭdu, en kiel altan sferon leviĝis nia afero! *(Legas.)* Al Ka-

rolo, pro Dia graco elektita Romia imperiestro, ĉiama pliiganto de la imperio, reĝo de Germanio, Hispanio, de ambaŭ Sicilioj, Jerusalemo, Hungario, Dalmatio, Kroatio kaj ceteraj, arkiduko de Aŭstrio, princo de Burgundio, grafo de Habsburgo, Flandrio kaj Tirolo ... Timige, ĉu?

ELINJO Dio mia ... Trabarakti inter pikdratoj de tiom da titoloj, tiom da oficoj ...

KOLHAAS Mi kuniros vin.

ELINJO Superflue. Sinjoro Müller ja diris: oni rigardas vin per nebonvolaj okuloj en la kastelo. Malgaja, senhelpa virina persono ... tiel diris Francisko ... gajnos la koron eĉ de tirano. Gardu Henrikon!

KOLHAAS Gardu vin!

ELINJO Ne prozorgu! Io ajn okazu: faru nenion!

KOLHAAS Mi atendos vin. Nagelschmidt ĵure promesis bremsi sian impulsemon. Tamen mi zorgas pro vi.

ELINJO Ankaŭ mia ŝirmanĝelo, ĉi tiu amuleto ĉie kunestos min. *(Legas la tekston ĉizitan sur la dorso de la ujeto.)* Mi leviĝos kaj irados tra la urbo; sur la stratoj kaj placoj mi serĉos tiun, kiun mia animo amas ... La infano jam dor-

mas ... Kisu lin anstataŭ mi! Mi jam parolas poete, kiel reĝo Salomono. *(Ili ridas.)* Kial vi skribis, ke mi leviĝos, kaj irados tra la urbo?

KOLHAAS Ĉu vi memoras, tiutempe mi ĉiam survojis. Al Dresdeno, Lejpcigo, Brandenburgo.

ELINJO Sed ĉiufoje vi revenis. Kiam mi nur ekforiris de ili, mi renkontis tiun, kiun mia animo amas. Ĉi tie ni sidis kun Henriko, atendis vin ĉiun vesperon. Kiel du statuoj ni nur rigardis la vojon. La patrinstatuo eĉ kantis. Mi muzikigis la sesan verson de la tria ĉapitro. Henriko ridis pri mi. Vi okulserĉas la fumkolonon, li diris, kaj mi mian patron. *(Zumkantas.)* Kiu estas li, kiu venas el la dezerto, kiel kolono de fumo? Ĉu bela?

KOLHAAS Doktoro Luther povus preni ĝin inter siajn preĝejajn kantojn.

ELINJO Pri via malfeliĉa Elinjo, kompreneble, ne pensis la kantema reĝo. Kiu estas ŝi, kiu iras el la dezerto, kiel kolono de fumo?

KOLHAAS Kvar blankaj ĉevaloj miaj flugigos ŝin tien kaj reen. La bastono de Nagelschmidt estos la kolono de fumo.

ELINJO Kie mi trovos mian vojaĝtukon? Ĉar ankaŭ ĝi estas donace portita de mia sinjoro. Mi

ĝin serĉis, sed mi ĝin ne trovis, mi volis ĝin, sed ĝi ne respondis al mi!

KOLHAAS Al mi ĝi respondis, ĉar jen ĉi tie ĝi troviĝas. *(Sterninte la tukon sur la ŝultrojn de Elinjo.)* Ne malvarmumu dumvoje!

ELINJO Ĉar la vintro jam forpasis, la pluvo pasis kaj malaperis. Ankaŭ Elinjo malaperis. Kaj kiam vi estos dironta en vi: mi ŝin serĉis, sed mi ŝin ne trovis, mi vokis ŝin, sed ŝi ne respondis! — mi jam estos ĉi tie kun la pravigo far la reganto.

NAGELSCHMIDT *(Enpaŝas.)* Aŭ kun lia kapo. *(je la malaproba gesto de Kolhaas)* Mi ŝercis.

KOLHAAS Elinjo kaj via vivo.

NAGELSCHMIDT Dio min tiel ŝirmu!

KOLHAAS Kiel vi respondos, se per ŝtono oni demandos vin?

NAGELSCHMIDT Per pano, sinjoro. Kaj kuko.

KOLHAAS Ĝuste. Kion vi jungos, se oni konfiskos ĉiujn kvar ĉevalojn viajn?

NAGELSCHMIDT Mian langon, sinjoro. Mian muzelaĉon. Al ĉiuj mi rekomendos la samon.

(Ĉiuj tri eliras. La sonoriletoj de la ĉevaloj aŭdiĝas, dum la scenejo mallumiĝas.)

DUA BILDO

Scenejo: la sama, unu semajnon poste. Dimanĉas. Mallaŭta, fora orgenado. Kolhaas sidas ĉefenestre kun Henriko en la sino.

KOLHAAS Ĉu vi vidas ion?

HENRIKO Ne.

KOLHAAS Mi ja same ne.

HENRIKO Kantu ankaŭ vi la hejmenvokan kanton!

KOLHAAS Mi ne konas ĝin.

HENRIKO *(zumkante)* Kiu estas ŝi, kiu venas el la dezerto, kiel kolono de fumo? Ĉu Berlino malproksimas?

KOLHAAS Tre malproksimas. Sed semajno jam forpasis. Via patrino devas alveni.

HENRIKO Kion ŝi portos al mi?

KOLHAAS Punon. Nu, vi ne devas ektimi. Por ni ambaŭ ĝi estos tia ... pundonaco. Por ni ĝojo kaj por la barona sinjorido de Tronka ... frapo sur la nazo.

HENRIKO Ĉu frapo?

KOLHAAS Sur la nazo. Via patrino portas la decidon de la reganto, en kiu estas ordonite: niaj du nigraj ĉevaloj regrasigitaj, estu senprokraste restituitaj.

HENRIKO Ĉu li povas senprokraste regrasigi ilin?

KOLHAAS *(mirfrapite)* Ne senprokraste. Nur laŭvice.

HENRIKO Do kial vi diris "senprokraste"?

KOLHAAS Mi forgesis, ke ĉio okazas nur laŭvice.

HENRIKO Ĉu ĉio?

KOLHAAS Vidu, mi refoje eraris. Ne ĉio. Ĉar la malfeliĉo — venas are. Miaj ĉevaloj estis forprenitaj, Herse trabatita kaj neniu volas restarigi la justecon. Estas bona nur, kio venas laŭvice.

HENRIKO Forte kaj laŭvice?

KOLHAAS Iom post iom.

HENRIKO Patro, kiuj venigas la malfeliĉon?

KOLHAAS Intriguloj.

HENRIKO Kaj la intrigulojn? kiu ilin venigas?

KOLHAAS Ĉi tiujn? La malfeliĉo. Ĉu insekto flugis en vian orelon?

HENRIKO Mi nur skue reĝustigas mian menson.

KOLHAAS Ĉu ĝi ne sidis ĝustaloke?

HENRIKO Ne ... por tio, kion vi diris.

KOLHAAS Se vi kreskos granda, mi klarigos al vi. Por tiam ĉio silentiĝos ĉirkaŭ ni. Plenkreskos ankaŭ la ĉevalidoj, libere ni iros-venos al grandaj foiroj. Tribunalaj servistoj ne frapos sur

pordoj, ili verŝajne retiriĝos kultivi teron. Se ni iros vizite al Berlino, kun plendo ni ne turnos nin al la imperiestro, sed ni nur promenos riverborde, plezurboatos sur lagoj, manĝos fritaĵojn, rigardos iluziistojn. Ho ... kio videblas tie!

HENRIKO Hm. Estus bone tuj plenkreski.

KOLHAAS Estus bone. Sed tiam mi tuj maljuniĝus. Kaj ankaŭ via patrino. Tion vi ne dezirus, ĉu?

HENRIKO Neniel estas bone.

MARIA *(ekscitita enkuras)* Via moŝto! Nagelschmidt ... Sola kaj surĉevale ... Tra la kampoj ... eĉ ne sur la ĉefvojo ...

KOLHAAS Fileto, eliru bele kun Maria ... Iru vi ambaŭ ...

MARIA Dio mia, Jesu-Kristo! Kio do okazis?

HENRIKO Patro! Ne forsendu min! Ne forsendu ...

KOLHAAS Vi povos tuj reveni, Henriko.

HENRIKO Ĉu tuj? Ne laŭvice?

KOLHAAS Tuj, fileto. Iru do! *(Maria, Henriko for.)*

NAGELSCHMIDT *(en)* Ni devas veturi al Schwerin, Mikelo, urĝe!

KOLHAAS Al Schwerin? Kial?

NAGELSCHMIDT Al Elinjo. Sinjoro Müller transportis ŝin tien.

KOLHAAS Transportis?

NAGELSCHMIDT Ni kuŝigis ŝin inter kusenojn, kuracisto akompanis ŝin el Berlino, al la gepatroj. Kvankam li donis severan ordonon ne halti kun ŝi ĝishejme, sed ĉe Potsdam ŝi dormiĝis. La kuracisto diris: se Schwerin pli proksimas, ni devas tuj transporti ŝin tien.

KOLHAAS Kio okazis?

NAGELSCHMIDT Iu korpogardisto de la reganto batis ŝin per lancofusto en la bruston.

KOLHAAS Kial?

NAGELSCHMIDT Ŝi tro proksimiris al la princo elektisto.

KOLHAAS Kie staris sinjoro Müller?

NAGELSCHMIDT Kelkajn paŝojn for. Antaŭtage li interkonsentis kun la estro de la korpogardo, ke la soldatoj preterlasos Elinjon, por ke ŝi povu persone transdoni la peticion al la reganto. Sed tiom opis la petantoj, ke antaŭ la Brandenburga pordego la korpogardistoj ektimis kaj komencis lance repuŝadi la amason. Elinjo, la kompatinda, proksimiĝis sensuspekte, svingante sian Lejpcigan tukon laŭinterkonsente en unu mano kaj kun la peticio en la alia al la reganto, kiu ne povis rimarki ŝin, ĉar li devis resaluti al la laŭtaj jubiloj. Laŭ

sinjoro Müller la estro de la korpogardo estis anstataŭigita per aliulo, kiu nenion sciis pri la interkonsento. Ĉi tiu havas la kutimon nenion permesi al la popolo ĉe festaj amasiĝoj, nur entusiasman jubiladon aŭ kantadon, ankaŭ tion nur kun vizaĝoj turnitaj kontraŭflanken, por ke iu, eble fivirino ne malutilu okulsorĉe al lia majesto. Pro la bato Elinjo svenis, ni povas danki al sinjoro Müller, ke la amaso ne morttretis ŝin. La peticion elprenis bonvola kavaliro el ŝia mano. Li eble transigis ĝin al la reganto.

KOLHAAS Kaj kie vi dume restis?

NAGELSCHMIDT Laŭ la instrukcio de Elinjo sur la korto de la gastejo, veturprete.

KOLHAAS Kion diris la kuracisto?

NAGELSCHMIDT Longedaŭran resaniĝon.

KOLHAAS Ĉu monaton? Unu jaron?

NAGELSCHMIDT Tiom li diris. Kiam ni kuŝigis ŝin en la ĉaron, ŝi rekonsciiĝis. Sidiĝis inter la kusenoj, vin vokis, poste postulis de mi pri Henriko, kial mi ne sidigas lin apud ŝin. Tra nazo-buŝo ekfluis al ŝi la sango, sed tio daŭris ne longe. La kuracisto diris, ke ĉi tiu movo bonfaris al ŝi, alie ŝi estus sufokita de la koagulita sango.

KOLHAAS *(post longa silento)* En la tago de ŝia resaniĝo mi metos la mortan verdikton de tiu korpogardisto sur ŝian tablon.

NAGELSCHMIDT Kun kies subskribo?

KOLHAAS Tiu de la reganto. De la imperiestro. Mi eklaborigos ĉiujn advokatojn de Eŭropo.

NAGELSCHMIDT Granda havaĵo necesas por tio.

KOLHAAS Haviĝos. Estos ankaŭ havaĵo. Transsendu la sinjoron intendanton Mann. Petu lin en mia nomo bonvole transveni en afero grava ankaŭ por li. Post duonhoro ni ekveturos al Schwerin. Post kvaronhoro.

NAGELSCHMIDT *(renkontas sursojle sinjoron Mann)* Sinjoro Mann!

MANN Mi venis nur, kara najbaro, ĉar mi vidis sinjoron Nagelschmidt hejmenrajdi kaprompe kaj sola. Ĉu okazis denove io malfeliĉa ... Mi petas vin, rakontu ajnon. Nur malfeliĉon ne. La kolero de la Di-Sinjoro, ni esperas, forpasos de ĉi tie aliloken.

KOLHAAS La kolero de la Di-Sinjoro ekloĝis en mia domo. Bonvolu sidiĝi, sinjoro Mann. Dum kelkaj minutoj mi volus fari interkonsenton kun vi. *(Li puŝas plumon kaj inkujon antaŭ lin.)*

Skribu, kalkulu: kiom valoras por vi mia farmo ĉe la bordo de Havel?

MANN Mi ne scias ... tiel eke ... kun tia subito ...

KOLHAAS Kiom vi promesis pasintjare?

MANN Pasintjare? Kiom mi memoras: kvindek. Sed mi petas vin, sinjoro najbaro ..., kio okazis?

KOLHAAS Mi ja rakontos. Mian domon en Dresdeno, por kiom vi aĉetos?

MANN Mi ne scias. Eĉ konjekton mi ne havas. Vi komplete perpleksis min.

KOLHAAS Ĉu ĝi valoras cent por vi?

MANN Mi eĉ ne scias, kie ĝi situas, en kiu punkto de la urbo. Kaj kiel granda, en kia stato ...

KOLHAAS Suburbo, ses ĉambroj, grundo, fruktoĝardeno. Se multe por vi, skribu sepdek. Skribu, mi petas vin! Plu! El miaj kvardek paroj da ĉevaloj — ĉu vi volas aĉeti dudek? Paro valoras tridek orguldenojn, kiom tio sumas?

MANN Mi ne povas tiel kalkuli! Ne konsideru min uzurpatoro! Kaj se mi estus tio, vin eĉ per ĝroŝeto mi ne malriĉigus ...

KOLHAAS Mi scias. Skribu: dudek paroj da ĉevaloj — kvarcent. La lasta oferto: mia domo. Mia

hejmo. Ĉi tiu domo. Ne miru, sinjoro Mann! Kiom vi donos por ĉi tiu domo?

MANN Por amo al Dio, sinjoro najbaro ... Ne ekkoleru min ... vi estas ekster via menso ... pala, kaj viaj manoj tremas ... Maria! Maria, glason da akvo al sinjoro Kolhaas! Kien vi intencas transloĝiĝi? Ĉu vi ne volas forvagi en la mondon?! Almenaŭ vi diru, kio okazis! Ĉu bankrotis iu via grandformata entrepreno? Diru al mi, mi helpos vin per prunto.

(Maria envenas kun glaso da akvo, metas ĝin senvorte sur la tablon, kaj kiel veninta, larmante ŝi eliras.)

KOLHAAS Prunton mi ne povas preni. Ne certas, ĉu mi povos redoni ĝin. Mi komencos novan proceson.

MANN Kontraŭ kiu vi procesos, kaj kial?

KOLHAAS Kontraŭ kiu? Kontraŭ Venceslao de Tronka, la Berlina Korpogardo, la Dresdena Tribunalo, sinjoro Hinz kaj sinjoro Kunz, Saksio, Brandenburgo kaj kontraŭ la tuta imperio. Kaj kial? Por ajne magra rekompenco, sinjoro Mann, por guteto da fido, kiun mi povas anticipi al Saksio; por fajrero da kredo, kiu retenas min fariĝi bandito.

MANN Mi ne povas tion mense kapti.

KOLHAAS Por kvarcent mi aĉetis la domon, vendas ĝin por tricent, la kontrakton formulu poste, ĉi tiun malplenan folion mi subskribos al vi.

MANN Bonvolu ne fari ion similan, iuj ajn povas vin trompi. Kun subskribita malplena papero ne kuru en la manon de homoj. Dio mem ne farus ion tian, kvankam Li vidas ĝis la fundo de nia koro, Li submetis eĉ sian fidelan filon Abrahamo al provo — petante pruve la sangon de Isaako.

KOLHAAS Tiu, en kies mano ni estas, povas permesi al si malfidemon: ankaŭ la lukson, ke ni rajtas ne kredi je Li. Lia potenco dependas nur de Lia potenco, ne de nia alkroĉiĝo. Mi havas nenian povon; mi bezonas ne dubi pri via honesteco. Kiom grandas tiu sumo?

MANN Cent orguldenoj antaŭpage, en la Dresdena banko. Kontrakton ni ne faros, nur se vi repaciĝos, sinjoro Kolhaas.

KOLHAAS Mi dankas vin. Por la mebloj mi sendos ĉaregon el Schwerin. La malgrandan abion mi kunportos el la ĝardeno. Elinjo plantis ĝin, kiam nia filo naskiĝis.

MARIA *(terurite)* Via moŝto ... la doganisto de Tronka kun du armitaj servistoj ...

KOLHAAS Mi ne vidu lin ĉi tie, alie mi mortpafos lin! *(Li malpendigas fusilon de la muro.)* Mi mortpafos la kanajlon! *(Li demetas la armilon.)*

(Frapo sur la pordo alstrata. Kolhaas relevas la armilon. Sinjoro Mann timigite kaptas lian brakon.)

MANN Sinjoro najbaro, kara amiko ... Remildiĝu! Mi ne rekonas vin. Vian kristanan pacienc-con.

KOLHAAS Ĉu ankoraŭ ekzistas kristaneco? Ĉu ankoraŭ eblas pacienco?

MANN Kie malaperis la malnova, milda Kolhaas?

KOLHAAS Kie li malaperis? Ĉu min vi demandas? *(reage al la denova frapado)* Enen, putoroj! Ankaŭ mi jam liberas en la agado.

MANN Vi ne liberas. Vi havas familion! Vi havas honoron.

KOLHAAS Mi havis. Se mi havis. Per kuglo mi ankoraŭ povas reakiri ĝin. *(Müller enpaŝas.)* Sinjoro Müller! Francisko! Kion sciigas al mi Elinjo? Kion diras la kuracisto? Ĉu tuj ni povos hejmenveturigi ŝin? Ne ĉare sur skuaj vojoj. Per

kaleŝo! Bele, mildveture ... Sur bona vojo ... Per kovrita kaleŝo ne estas riske, ĉu?

MÜLLER Elinjo sciigas ...

KOLHAAS Jam diru!

MÜLLER Pardonu tiujn, kiuj kulpis kontraŭ vi.

KOLHAAS Ĉu nur tiom? Ĉu nur ĉi tiun katenon ŝi sendas?

MÜLLER Ĉi tiuj estis ŝiaj lastaj vortoj.

KOLHAAS Ĉu ŝiaj lastaj vortoj?

MÜLLER Kaj ŝia lasta deziro, sciigi tion al vi.

KOLHAAS *(Transprenas la pendujon kun kolĉeno.)* Di-Sinjoro, kiam?

MÜLLER Ŝi mortis je la kvara matene. La internan sangadon la kuracisto ne plu scipovis ĉesigi.

KOLHAAS Ne scipovis ... Ne povis ja vidi ... Aŭ eble li tute ne estis kuracisto. Sed kunkulpulo de la korpogardistoj. Sed por kio mi parolas? ... *(al la enpaŝanta Nagelschmidt)* Karolo ... mi mortigis mian edzinon ... Mi ne devus lasi ŝin iri. Ŝi mortis viktime de mia malkuraĝo. Mildanima virino ... kun preĝsimila peticio. Mi ĵetis ŝin al la fiuloj kiel peticion.

MÜLLER Vi ja scias, ŝi insistis ...

KOLHAAS Ĉar ŝi domaĝis min. Kaj ŝi kredigis al si, ke ili rigardos ŝian malfortecon pli favorkore. Ilia koro ekkompatos la oferindan ŝafon. La sangon de Isaako petis la Di-Sinjoro nur prove. Tiun de Elinjo Li akceptis. Li forgesis la anĝelon, kiu ĝustatempe retenus mian manon.

NAGELSCHMIDT Aliulan kulpon ne prenu sur vin, Mikelo!

KOLHAAS Li ne havis por mi savanĝelon. Eble Li pravis. La Di-Sinjoro, se ekzistas en Li kompato, same ne povas toleri, ke anstataŭ armitaj viroj ni serĉu la veron per armeo de peticiantaj virinoj, pri kies ŝajno ni finfine kontentiĝus.

MARIA *(Venas kun Herse. Ŝi premas la pendujon en la mano de Kolhaas al sia vizaĝo kaj kisas ĝin. Ŝi eksplodas en laŭtan ploron.)*

KOLHAAS Ni elfalis, Maria, el la graco de Dio. Sed eĉ el Lia intenco. *(Ie el la ĝardeno aŭdiĝas la kanto de Henriko: "Kiu estas ŝi, kiu venas el la dezerto ...)* Kiu estas ŝi, kiu venas el la dezerto kiel kolono de fumo? Kiu? *(De ekstere aŭdiĝas orgenado indikanta la finon de la diservo. Nagelschmidt abrupte paŝas al la fenestro, volas preni la fusilon de sur la tablo, Kolhaas ne permesas al li.)*

MARIA *(time)* Tribunalaj servistoj!

VOĈO *(de ekstere)* Nagelschmidt!

KOLHAAS *(prenas la armilon en la manojn, malfermas la fenestron.)* Mi mem respondos. *(Pafas. Tribunala servisto ekkrias, Kolhaas turnas sin al Nagelschmidt.)* Kiom da ĉevaloj mi havas hejme?

NAGELSCHMIDT Sep.

KOLHAAS Sep homoj, sep fusiloj, sep ĉevaloj. El la tombo ni ekmarŝos al Tronka.

KURTENO

TRIA AKTO

UNUA BILDO

Scenejo: kastelo de Tronka, kies pluraj apertaj ĉambregoj vidiĝas de antaŭe. Meze granda manĝoĉambro, dekstre la ofica ejo de la kastelkomandanto, maldekstre familia kapeleto. Kiam la kurteno leviĝas: fratino Antonia preĝas, en la granda manĝoĉambro sinjoroj festenas. Ĉeestas: barono Venceslao, barono Günther, Hinz, Kunz, Kallheim, prokuroro Zauner, prokuroro Eibenmeyer. En la dekstra ĉambreto la kastelkomandanto kartludas kun la doganisto.

GÜNTHER Amikoj! Baronaj moŝtoj, sinjoroj prokuroroj, mi petas silenton.

VENCESLAO *(tablokape)* Ni aŭdu Günther!

PLURAJ Ni aŭdu, ni aŭdu!

GÜNTHER Amikoj, mi devas malkaŝi la sekreton de nia hodiaŭa kaj ĉiuj niaj ĉasadoj, la propran motivon de la fervorado de barono Venceslao ...

PLURAJ Ni ja scias. Ni konas ĝin. Publika sekreto. Ne cervo, nek leporo.

GÜNTHER Ne cervo, nek leporo. Sed amazono. Ĉu vi vidis ŝin?

PLURAJ Kiu ne vidis? Kiu ne admiris ŝin? Kiun ŝi ne delektis?

GÜNTHER Jes ja, ni vidis ŝin. Sed kiu atentis al nia gastiganto? Ĉu li alfajrumis almenaŭ unufoje preterfuĝantan sovaĝbeston?

HINZ Pafon ja ni ne aŭdis.

GÜNTHER Ĉar li sonigis nur sian koron. Ili sidiĝis sur pitoreska herbejo, kaj ... kion ili kantis?

KUNZ Disiĝi jam ne povas mi de ŝi ... *(Ridado)*

GÜNTHER Kaj kial? Ĉar: *(li kantas)*
Mi ekkonis ŝin, horo ho tre rava ...

ĈIUJ ekardis korp', animo en amoro,
ŝin nur vidas mi ekde temp' tiama,
koron mian katenis ŝia bono,
disiĝi jam ne povas mi de ŝi ...

KUNZ Disiĝi jam ne povas mi de ŝi ...

VENCESLAO Sinjoro Kunz scias nome nur ĉi unu verson. *(Ili ridas.)*

KUNZ La postsekvon de la interkonatiĝo. La aferon plej gravan.

GÜNTHER Sed kiom pli bela estus, amikoj, ĉi tiu renkonteto, se ni ĉiuj havus iometon da ĉi-specaj postsekvoj. Kie estas, Venceslao, la knabinoj de la pasinta fojo?

HINZ *(entuziasme)* La knabinoj!

VENCESLAO *(kantas)* Kie la knabinoj?

ĈIUJ Kie la knabinoj,
la silke jupitoj,
kun knabinoj tage, nokte
La kiso dolĉas.

KUNZ La kiso dolĉas!

VENCESLAO Sinjoro Kunz blovas jam denove la esencon!

KUNZ Li blovas kaj atendas ĝin.
(Ili ridas, intertintigas la pokalojn, trinkas.)

KASTELKOMANDANTO *(frapĵetas la kartojn, ekstaras, prenas sian mantelon)* La diablo forprenis nian partion. Mi povas ekiri, por kolekti jupulinojn.

DOGANISTO Ĉi-foje ili eble forgesas ...

KASTELKOMANDANTO Kvazaŭ vi ne konus ilin. Kiam ili ekgurdas ”la silke jupitoj”, mi jam povas rompi la kapon, kiujn mi prenu el la kampoj. Sed ĝis ĉi tio nenio malfacilas. Oni alfajfas, ili venas. Ĝis la ĉaro. Sed ĉe la surĉarigo ili jam ŝrikas kiel porkidoj, iuj rezistas, sen vipo eĉ ne moviĝas kaj krivokas la patron. Tiam venas la patro, frato, bofrato, ili grincas la dentojn, oni devas ilin enkarcerigi, kaj la laboro suferas. Multan monon kostas al ni ĉi tiu kanto.

VENCESLAO Komandanto!

KASTELKOMANDANTO *(en)* Jes s'joro!

VENCESLAO Kie la knabinoj, la silke jupitoj ...

KASTELKOMANDANTO Kiom ordonas via moŝto?

VENCESLAO Ni nombru ... Günther, Hinz, Kunz, Kallheim, Eibenmeyer ...

KASTELKOMANDANTO Bonvolu tiel kalkuli, ke ankaŭ sur la kampoj restu kelkaj.

VENCESLAO Tiel ni kalkulos.

KASTELKOMANDANTO Ni restos sen aveno. Estu permesite al mi rimarki, ke ĉi tiu kanto prenos ĉiun nian avenon.

VENCESLAO Jam denove vi prozorgas?

KASTELKOMANDANTO Ĉu tri sufiĉas?

VENCESLAO Ĉaron da ili!

KASTELKOMANDANTO Ĉu urĝe aŭ post lavado?

VENCESLAO Tiel, kiel ili statas. Kun tero kaj cetero. *(For)*

KASTELKOMANDANTO *(en la ĉambreto al la doganisto)* Restu ĉi tie por la kazo, se io ankoraŭ enkapiĝus al ili. *(Ekiras malsupren sur la longa ŝtuparo. La doganisto malfermas la fenestron, poste pretigas sin por dormi.)*

GÜNTHER Sed ankaŭ ĝis tiam: ĉu gustumeto da jupulinoj ne troviĝas en via tuta rezidejo?

KUNZ Kie la knabinoj? La kiso dolĉas.

VENCESLAO Se ne ni honoros fratinon Antonia per fingringo da vino ...

(Fratino Antonia, kiun la festenado ankaŭ pli frue ĝenis, komencas subaŭskulti ĉe la pordo.)

HINZ Kun la fratino tage, nokte dolĉas la kiso. *(Ili ridas.)*

KUNZ *(kantas)*

Frateto marŝetis ame
kun fratino man-en-mane
Majo estis, aj, aj, oj, oj!

VENCESLAO *(atentige)* Fianĉino de Jesuo.

GÜNTHER Jesuo foras. Ni pli proksimas. *(Rido.)*

VENCESLAO Fratino Antonia!

ANTONIA *(en, ektime)* Mi preĝis ĝuste ...

VENCESLAO Nur gluteton ... Buŝpleneton ... Belega fianĉino de Jesuo. *(karesas ŝin, post kio la aliaj ĵetas sin sur ŝin. Ili deŝiras ŝian vestaĵon, kisadas ŝian kolon, ŝultrojn, malferminte perforte ŝian buŝon trinkigas ŝin, kaptadas ŝin el brako en brakon. Voĉoj: "Fianĉino de Jesuo! Rosfreŝa korpo! Sentuŝiteco! Senkulpeco! Frateto marŝetis ame! Kun fratino man-en-mane!")*

ANTONIA Lasu min! Helpo! Jesuo mia, helpo!

VENCESLAO Kie estas Jesuo? Li tre distas!

ANTONIA Helpo! Jesuo mia, helpo! Doktoro Luther! Doktoro Luther! Helpo! Sovaĝbestoj! Vi ĉiuj venos al la infero. *(Voĉoj: "Dolĉa povas esti la infero kun fratino Antonia! Ni ĉiuj falegos en la inferon! Kun ŝi kaj per ŝi!")*

VENCESLAO *(vidante, ke la fratino prenas tranĉilon)* La tranĉilon! Forprenu de ŝi la tranĉilon!

ANTONIA Dio pardonu vin! *(Puŝas la tranĉilon en la koron.)*

VENCESLAO *(post kiam en konsterna silento oni kovras la mortinton)* Mi ja forgesis doktoron Luther. Morgaŭ li devus inici nin ĉiujn en la reformitan religion.

KALLHEIM Oni ekscios la aferon supre en la kortego.

EIBENMEYER Vi ofertos kelkajn el viaj papistaj parencoj al la reformacio.

ZAUNER Tra deĵorantaj oreloj tuj ekaŭdos tion ankaŭ la princo elektisto.

EIBENMEYER Se tiel, jam nun oni povas pligrandigi la oferton da parencoj. Ni enterigos ŝin en la ĝardeno.

GÜNTHER Sinjoro prokuroro Zauner, ni esperas, vi ne apartenas al la deĵorantaj oreloj.

ZAUNER Mi esperas: nek sinjoro prokuroro Eibenmeyer.

EIBENMEYER Kies oreloj deĵoras inter ni, sole Dio kapablus diri. Eble ĝuste tiu, kiu diras tion pri aliulo. Aŭ ĝuste tiu, al kiu li diras tion. Aŭ ambaŭ. Aŭ nek unu, nek alia, sed iu forestanta tria. Eble via plej bona aŭ tia konsiderata amiko, drinkkamarado. Aŭ nek li, nur lia orelo, kiu fremdiĝinte de sia mastro, memstariĝinte, sen ties konscia konsento laboras, tio estas subaŭskultas. Mi diras ekzemplon. Nia amiko prokuroro Francisko Müller, kiu ne ĉeestas, ĉu ne, kiel priavancis nin ĉiujn, kaj promociiĝis ĵusnune imperiestra prokuroro? Ankoraŭ ne scieblas, ĉu ne sur niaj dorsoj li trančis al si ŝtuparon por la leviĝo? *(Lanco enflugas, kaj frapiĝas en trabon. Venceslao prenas paperrulaĵon de ĝi.)*

VENCESLAO Deĵorantaj Oreloj, atenton! Sennecese, teruradi unu la alian. Jen legeblas timigo por ni ĉiuj. *(Legas.)* Al barono de Tronka kaj liaj kompanoj. Aŭdu min, vi degenerinto disde Dio, predisto misnaskita el mikso de hunda fikemo kaj azena seksardo! Mi alvokas vin, restituu al mi en dudekkvar horoj du miajn

konfiskitajn ĉevalojn, kvindek groŝojn ŝtelitajn el mia poŝo, la alproprigitajn mantelon, ĉapelon kaj vojaĝsakon de mia servisto Herse Hutten kaj ankaŭ la entenatajn proprajn, nome: unu, tio estas unu pecon da argila pipo, dekdu groŝojn, fajroŝtonon, tindron kaj pippurigilon, en kontraŭa kazo mi bruligos vian kastelon, ebenigos ĝin kun viaj teroj, kaj vin kune kun via amiko Günther, inde distranĉitajn manĝigos per viaj korpaj animaj proksimuloj, la porkoj. Dato en Schwerin, anno domini, kaj tiel plu, subskribo: Mikelo Kolhaas, arkanĝelo.

(Konsterna silento. De ie paŝobruo.)

KUNZ *(kun timo)* Venas la knabinoj.

(Günther estas kaptita de konvulsia ridego. Iom post iom ĉiuj komencas ridegi. Dume Nagelschmidt, poste Herse ensaltas tra la fenestro de la malgranda ĉambro. Ili kaptas la dormantan doganiston.)

HERSE Ĉu ni tradraŝu lin?

NAGELSCHMIDT *(signalas, ke ili elĵetos lin tra la fenestro)* Ĉi tiu sonĝos, ke li flugas. Se dumfluge al li kreskos flugiloj, li saviĝos.

(Ili elĵetas lin. Post kelka tempo hurlado.)

HERSE Ne kreskis.

(Paŝobruo. La sinjoroj ridegas. Sur la ŝtuparo aperas du pliaj armitaj ĉevalistoj.)

VENCESLAO Kaj ankaŭ la pippurigilon! *(Ili ridas.)*

GÜNTHER Ankaŭ la tindron!

HINZ La fajroŝtonon! *(Ili sufokiĝas pro ridego.)*

(En la malantaŭa pordo aperas Kolhaas. Al la sinjoroj suspendiĝas la spiro. Nur Venceslao ankoraŭ ridegas, ĉar li ne vidas Kolhaas. El la malgranda ĉambro enpaŝas Nagelschmidt, Herse kaj la ceteraj du ĉevalistoj. Pliaj tri ĉevalistoj post Kolhaas.)

KOLHAAS *(antaŭeniĝas. Venceslao eltiras la glavon, Kolhaas elbatas ĝin per unu movo el lia mano.)* Vian vivon mi ne bezonas, sinjoro. Mi pli insistas pri la pippurigilo. Kaj post grasigo: pri miaj ĉevaloj.

VENCESLAO La ĉevalojn forportis la senfeligisto.

KOLHAAS Ĉu la ĉevalojn forportis la senfeligisto? Mi bedaŭras, barona moŝto. Vi postiros ilin sur la ĉevalo de la Osta Falĉisto.

NAGELSCHMIDT Por la ĝojo de la senfeligistoj ni devos fari el vi hundonutraĵon. Mi nur ne scias, laŭ kiu recepto prepari ĝin: ĉu kun kaĉo aŭ miksitan kun brano.

KOLHAAS Pardonu al li, se li iom neelekteme parolas.

VENCESLAO Ankaŭ via alvoko ne tro diferencas.

KOLHAAS Helpis li en la konceptado. Bedaŭrinde ankaŭ la sciigon pri via morto mi publikigos pere de li. Je elektema stilo do ne kalkulu, barona moŝto.

VENCESLAO *(senespere)* Komandanto!

KOLHAAS Ankaŭ je la gardistoj ne kalkulu. Ili jam dormas — aliloke en la transmondo. La komandanto same.

VENCESLAO Ne forgesu, Sinjoro Ĉevalkomercisto, ke ĉiuj bienuloj de la ĉirkaŭaĵo kontraktis pri reciproka helpo. Ni havas armitajn taĉmentojn ...

KOLHAAS Havis.

HINZ En Lützen mi havas kvindekkapan trupon ...

KOLHAAS Kiu disfalis.

NAGELSCHMIDT Kune kun via kastelo, sinjoro.

KUNZ Kaj Pleissenburg?

KOLHAAS Ĝispolve bruligita.

KALLHEIM Mia intendanto en Vitenbergo iel sciiĝos pri la afero.

KOLHAAS Vitenbergo estas indulgita. La sola escepto: via kastelo, prokurora moŝto Kallheim.

EIBENMEYER Kaj Lejpcigo?

KOLHAAS En Lejpcigo montriĝis la domo de prokurora moŝto Eibenmeyer superflua.

EIBENMEYER Kaj mia familio? La domanoj?

KOLHAAS Kiel tio kutime okazas. Kiu kian bonŝancon havis. Sinjoro Zauner trankviliĝu, Dresdenon ni ne tuŝis. Ĉu iu ankoraŭ intencas interesiĝi pri sia bonfarto?

GÜNTHER Kun ordinaraj servutuloj ribelantaj, banditoj kaj infanmurdistoj ni ne konversacias. En Jassen mi havas arsenalon, soldularon.

KOLHAAS Je mia servo. Mi pli bone pagas, sinjoro. Mi monigis ĉion mian. Samkiel sinjorido Venceslao senigis min je ĉio. Je mia paca intenco kaj patrino de miaj infanoj.

GÜNTHER Mia patro sciiĝos prie.

NAGELSCHMIDT Nur jam en la ĉielo. Se fakte li tien venis.

GÜNTHER Ankaŭ lin vi murdis! Hundoj!

(Günther ĵetas sin sur Kolhaas, kiun de malantaŭe ankaŭ Venceslao ekatakas. Komenciĝas ĝenerala interpuŝiĝo. La sinjoroj diskuras, la ĉevalistoj post ili. Nagelschmidt mortpikas Günther, poste ĵetas sin sur Zauner.)

KOLHAAS Zauner ne tuŝu!

ZAUNER Dankon, sinjoro Kolhaas. Mi rekompencos vin. *(For)*

KOLHAAS *(kaptinte Venceslaon ĉebruste)* Ŝnuron, Karolo!

NAGELSCHMIDT Feron al li, ne ŝnuron! *(Elkurante.)* Herse. Ŝnureton al la Tronkaano!

VENCESLAO Ni dividos ĝin. Unu fino ĉirkaŭos vian kolon.

KOLHAAS Tia honoro ne propriĝos al vi. Hundon ni pendumos nur kun bojulo. Sed unue mi igos ligi vin sur ĉaro, kaj veturigos vin inter la homoj; preter la prokuroraj moŝtoj; preter la tribunalaj konstruaĵoj; preter la justodonaj potenculoj; unue mi montros vin al la leĝo — nome de la leĝo ... *(Ellasas Venceslaon; (ĉi tiu regresas al la enirejo de la kapelo. Li malfermus ĝin, sed la pordo estas ŝlosita.)*

VENCESLAO Kiu punfrapos vin.

KOLHAAS Vi eraras, fiĝermo de rato! Mi jam staras eksterleĝe. Ekster ĉio, kion iam mi konsideris deviga, diodevena. Eĉ la propran morton mi transpasis. Mi loĝas, kie mia edzino: en Nenio, en tombejo.

VENCESLAO Ribelintojn, preĝejrabistojn kaj husanojn oni trenadis eĉ elsubtere sur brulŝtiparon. Ne fidu al via unusola feliĉa horo, Kolhaas. Vi

ne havas armeon tiel grandan, kiel la duko de Meissen, de la princo elektisto.

KOLHAAS Ili ne havas tiel grandajn funebron kaj perdon, kiel mi. Per kiuj ili terenluktis kaj armis min. Ankaŭ perdo estas armilo, se vi ne scius tion ... Sed de kie vi scius. Neniam oni prenis ion de vi. Eĉ kion vi kunŝteladis: per aliulaj manoj vi akaparis. Per tiuj de tribunalaj servistoj miajn ĉevalojn ... Per mensogo mian laŭleĝan rajton, nome de nia komuna Dio mian paciencon ...

VENCESLAO Anstataŭ du mi donos dekdu ĉevalojn ...

KOLHAAS Ĉu vi proponas marĉandon? Dum la intertraktado perdiĝis ĉio mia. Dum la observado de la leĝoj. Dum la laŭdado de la superularo. Dum la humilaj peticiadoj kaj esperadoj. Nun mi mem prenas la leĝon en la manon, la leĝon, kiu devus gardi min. Miajn rajtojn. *(Elĵetas brulantan torĉon tra la fenestro.)*

VENCESLAO Rajtojn de bruligisto?

KOLHAAS *(elĵetas plian torĉon)* Mian hejmon. Edzinon. *(Post la tria torĉo.)* Mian pacan intencon.

VENCESLAO Kiu jen, estis mensogo.

KOLHAAS Ĉar mi konstruis sur akvo. Sur mensogoj de instancoj. Sur mia facilkredemo! *(Fumo saltleviĝas el la kastela korto.)* Bela incensa fumo, ĉu ne? Fumo de miaj peticioj. De la atendatoj. De la petskribo, kiun oni elbatis per lanco el la mano de mia Elinjo. Elinjo! Kiu pardonos al mi, ke mi ĵetis ŝin inter la lancojn de korpogardistoj?! Kaj kion ja mi komencus kun la pardono? Kion mi komencos, Tronkaano? Genuen, fripono! Mi aŭdu vian lastan preĝon!

VENCESLAO Indulgon, Kolhaas! Ankaŭ vi estas en la mano de Dio.

KOLHAAS Estis. Nun jam mi estas lia mano.

(La virinoj, rifuĝintaj en la kapelon, kantas.)

Indulgu min Dio
pro kulpemo mia,
kompatu al koro
ĉi melankolia ...

NAGELSCHMIDT *(enkuras kun ŝnuro en la mano)* Brulas la fojnejoj.

KOLHAAS Ili brulu!

NAGELSCHMIDT Ĉu mi ligu lin?

KOLHAAS Nenecese. Mi kondamnis lin al morto.

VENCESLAO Indulgu min! Jesuo ĉi-apudas! Jesuo sur la kruco. En via proksimo ...

NAGELSCHMIDT Fia hipokritulo!

KOLHAAS Lia kruco validas mola kuseno rilate al la mia, sur kiun vi surnajlis min, murdisto de Elinjo!

NAGELSCHMIDT Unue ni devus iom rosti lin.

KOLHAAS Mi nur suferas, vidante lin viva. Li mortaĉu laŭeble plej rapide!

NAGELSCHMIDT For la ŝakristojn de ĉi tie!

(Ĉi-momente enpaŝas Marteno Luther.)

LUTHER Mikelo Kolhaas! Kolhaas! Kion vi arogas al vi? Kiel vi aŭdacas enrompi armile ĉi tien? Blindigita homo, malfermu la okulojn: antaŭ kiu vi staras?

KOLHAAS Antaŭ persono plej kara al mia koro, kiun iam ajn mi konis. Doktoro Luther.

LUTHER Rigardu al la vundoj de la Nazaretano, ne al mi, vi fatale misvojinta malfeliĉulo! Kiel vi povis ŝajnigi vin esti la misiito de la ĉiela kolero. En la furiozo de la freneza pasio kiu donis la glavon de la vero en vian manon, ke vi mem juĝu super kristanoj laŭ propra kapo kaj mapo en la ebrio de venĝemo? Kiel vi

sola povas serĉi vian veron, se ankaŭ vi mem estas ĝisoste infektita per maljusto?

KOLHAAS Kun tristo, via pastra moŝto.

LUTHER Por la homa tristo estas promesita konsolo; por maljusto damno.

KOLHAAS Kun mi okazis maljusto.

LUTHER Kun vi? Per vi, prefere. Al pacemaj komunumoj vi rompĵetis vin tage kaj nokte simile al la lupoj de la dezertoj. Senkulpulojn konfiditajn al la protekto de Dio vi falĉis glave sub la preteksto de proceso iniciatita por senutila bagatelo. Kien vi apartenas, Mikelo Kolhaas? Ĉu ne sub la provincestron kaj la princon elektiston? Kiu retiris vian rajton ricevi laŭleĝan rekompencon pere de la superularo?

KOLHAAS Mi provis, via pastra moŝto ...

LUTHER Hezite kaj senpacience, kun anticipa malfido, intermiksante oficiston kun provincestro, identigante tribunalajn servistojn misgvidantajn vian aferon kun la ekzistanta hierarĥio. Ĉu jam enkapiĝis al vi, kiel longan kalvarion vi ekiris pro via miopeco ĉi-tere kaj ankaŭ trans via morto? Via proceso havos tiamaniere neniam finon. Kiel vi povos

akuzi la teran superularon en la ĉielo, se tiu ĉi ĝis hodiaŭ nenion sciis pri via bagatela plendo? Sinjoro, ĉi tiun homon kun la sangogutantaj manoj neniam mi vidis, des malpli mi mistraktis lin. Tion povos diri la superularo antaŭ la trono de Dio. Kaj ĝi pravos. Anstataŭ proprajuĝado kial vi ne pli humilis kaj diligentis en la serĉado? Kaj kion komunan havas via afero, viaj ĉevaloj, la vojaĝsako de via servisto kun la servutula armeo sekvanta viajn spurojn, ree ribelanta post tiom da sangoverŝado? Ĉu vi informiĝis pri tio, ke en la ĉirkaŭaĵo de Pleissenburg kaj Lützen oni disfamigas la reviviĝon de Münzer, ke estas ĝuste vi, kiu anoncis publike la revolton. Ho karaj sinjoroj, kun kia plezuro la Sinjoro batos inter vi, maljunaj argilaĵoj per sia ferbastono! Ĉi tiujn vortojn diris Münzer, nun jen, oni atribuas ilin al vi.

KOLHAAS Ĉi tiujn vortojn mi ne elparolis, sinjoro.

LUTHER Viaj agoj antaŭis ilin. Viajn bataladojn, bruligadojn, manifestojn najlitajn sur la muro de kasteloj. Vian tutan senesperan entreprenon. La plej bona el miaj plej bonaj adeptoj,

Kolhaas! Kiel vi povis tiom forpuŝi vin de Dio?

KOLHAAS Mi helpis mian esperon, via pastra moŝto, per mia senespero.

LUTHER Kia esprimo! Per senespero! Via senespero meritas ŝtiparfajron. Ĉu nun vi uzas ĉi tiun paganan vorton, kiam nia liberigita religio definitive solidiĝas?

KOLHAAS Ĉio solidiĝas. Nur mia vivo kolapsis.

LUTHER Ĉar vi estas egoisto, blindigita en via malfeliĉo kaj malamiko de nia reformita kredo. Se vi ne scius, Romo preparas sin al nova atako, ne via ĉevalo kaj sako: la afero de ni ĉiuj staras sur la karto, ni bezonas konkordon, kaj ne diskordon.

KOLHAAS Tiel devus esti.

NAGELSCHMIDT Via pastra moŝto! La imperiestron vi mem nomis tirano kaj la saksan princon porko? Ke unu doganon post la alia, unu imposton post alia postulante ili agas, ke tio eĉ de rabistoj kaj friponoj trous — vi mem diris tion, via pastra moŝto, antaŭ la granda popolleviĝo?

LUTHER Ĉio havas sian tempon. Kiu ne scias, ke en la historio ĉiu horo havas alian ordonon, kaj io

ĉiam pli gravas, ol estis antaŭe, tiu ne aŭdacu interrompi miajn vortojn. Nia komuna afero estas la reformacio, nia komuna malamiko estas Romo. En Parizo kaj Venecio oni tiras niajn samkredanojn al brulŝtiparo! La papistoj ne diferencas laŭ bienuloj kaj servutuloj. Nian tutan nacion minacas la infero de la kontraŭreformacio, kaj vi je la nivelo de la pensado de kvarpieduloj murdadas ĉi-lande tiujn, kiuj revenis al la pura evangelio?

KOLHAAS Ankaŭ mia edzino, fidelĵurinta kunulino revenis, sinjoro. Ĉu vi scias, kio okazis kun ŝi?

LUTHER Mi scias. La punadon de la deliktuloj mi mem petis de la reganta princo. La morton de Elinjo ankaŭ mi priploris, Mikelo Kolhaas, sed per niaj larmoj ni ne rajtas inundi la Aferon, por kiu ni oferis nian vivon kaj saviĝon. Promesu, frato mia en la kredo, filo Mikelo, ke vi demetos la glavon, kiu estas la armilo de rabado kaj sangosoifo. Vi demetos ĝin nun, kaj la koleron demetos ankaŭ barono Venceslao. Per la lasta deziro de via edzino la Sinjoro alparolas vin: pardonu al viaj ŝuldantoj ...

(Je la mansigno de Luther Venceslao paŝas apud Kolhaas.)

KOLHAAS Mi ne povas fari, via pastra moŝto. Eĉ preze de mia saviĝo.

(En la kvar anguloj de la kastelo eksonas kornoj.)

LUTHER La komuna armeo de la duko de Meissen kaj la reganta princo. Ne mi venigis ĝin kontraŭ vi. Kvankam mi devus tion fari. Ĉu vi ne donos al mi la manon, Kolhaas?

KOLHAAS Antaŭ multaj jaroj oni asignis antaŭ la imperian asembleon en Worms homon, flamaniman viron, kiu per sia kuraĝo renversis la mondon. Oni venigis lin antaŭ rigorajn kaj malamikemajn juĝistojn, por ke li retiru siajn instruojn antaŭ la imperiestro. De unusola gesto lia dependis lia vivo aŭ morto surŝtipara, li tamen diris: Mi ne povas kaj volas ion ajn retiri, ĉar nek konsilindas, nek salutindas ion ajn fari kontraŭ nia konscienco. Mi malhavas la intencon kompari min kun viro, antaŭ kiu nun mi staras, kiun dekomence mi akceptis en mian koron, kun Marteno Luther. Mi ne havas instruojn; mi povis doni nenion grandan, valoran al la homoj, kies reti-

ron iu ajn postulus de mi. Sed kiom nesignifa estas mia persono: tiom terura kaj neriparebla estas mia perdo. Vi certe pravas: ĉio ĉi grandas kiel polvero en via potenca vero. Sed kiu kulpas pri tio, ke kiel polveron ni ricevis ankaŭ nian vivon, la unusolan? Kiu disponis tiel, ke sen la vero de la polvero ankaŭ la universalaj juro kaj vero sensencigas, kiujn ni devus ne serĉi, postkuri, kiel infano ĉielarkon, sed ili devus troviĝi ĉie, kie ili estas anoncitaj. La anoncita kaj ne realigita vero, la Dresdena kaj Brandenburga konstitucioj, sinjoro, pli naŭzigas, ol la aperta mensogo, ĉar ili efikas kiel lognutraĵo; la hundo grincigas la dentojn aŭ forkuras, se mi ĵetas feran forkon al ĝi, sed lekante la manon ĝi mortas pro peco da venenita pano. La kredemo kaj la peticianta espero metis finon al la vivo de Elinjo. Eble la infano, kiu atendas min en Schwerin, post la patrino nun perdos ankaŭ la patron. Mi povas heredigi al li nenion, nur la orfecon, kiu edukos lin el genuanta espero al rektiĝinta senespero. Tiu viro, la iama doktoro Marteno Luther same rektiĝis en la imperiestra asembleo en

Worms, kaj diris: jen ĉi tie mi staras, alie agi mi ne povas. Dio min tiel helpu, amen.

LUTHER *(pli milde)* La iama Marteno Luther ankaŭ hodiaŭ pretas morti por la vero de la Filo de l' Homo. Sed la ordono de la vivo estas ne la morto, sed ties evito: ne la suicida senespero, sed la saĝa agado. Prudentulo antaŭvidas malbonon kaj kaŝiĝas; sed naivuloj antaŭenpaŝas kaj difektiĝas. Ĉar kiu troviĝas inter la vivuloj, tiu havas esperon; ĉar eĉ al hundo vivanta estas pli bone, ol al leono mortinta. Sufiĉa puno estas por ni la konscio pri la morto. Por ties plenumiĝo necesas vira kuraĝo, ĉar mortintoj scias nenion, kaj por ili jam ne ekzistas rekompenco.

KOLHAAS Tio jam delonge plenumiĝis pri mi.

LUTHER Tiu rekondukos vin en la vivon, pri kies bonvolemo vi armile dubis. Legu, barona moŝto! *(Transdonas paperrulaĵon al Venceslao.)*

VENCESLAO Ni, princo elektisto de Saksio, konsiderante, ke Marteno Luther antaŭ ni pledis por li, persone ekzamenis la plendon de la ĉevalkomercisto Mikelo Kolhaas, kiun ni trovis perfekte prava. Sekve: ni ordonas la redebaton de lia proceso kaj la punon de ĉiuj, kiuj ma-

lobeis la leĝojn de la paca komercado kaj nia ĝenerala Ordo. Por la senĝena juĝagado ni garantias liberan vojon al Mikelo Kolhaas al Dresdeno, kaj ni amnestias lian tutan taĉmenton. Ni kondiĉigas, ke nomita ĉevalkomercisto en tri tagoj post la ricevo de jena dispono demetos kaj demetigos la armilon, plue ĉiun lian militan predon li liveros kiel princan proprietaĵon al la tribunalo de Lützen. Dato, kiel supre ... Kaj la ofendo farita al mi? Kio okazos kun ĝi, via pastra moŝto?

LUTHER Petu, kaj estos donite al vi ... Frapu, kaj estos malfermite al vi. Kolhaas, demetu la armilon! *(Kolhaas frapĵetas sian glavon en la trabon.)*

NAGELSCHMIDT *(kriante)* Mikelo! Vi trompis min! Vi perfidis min!

LUTHER Petu, kaj estos donite al vi ... Frapu, kaj estos malfermite al vi! *(For)*

(La sceno mallumiĝas, la tumulto iom post iom silentiĝas.)

DUA BILDO

Foirplaco de Dresdeno. Jubilanta amaso, tribunala tablo. Fone podio, kovrita de blanka tuko. Eniras Kolhaas, Nagelschmidt, Herse kaj kun ili kelkaj ĉevalistoj. Voĉoj: "Vivu Kolhaas! Justecon al Kolhaas! Punon al la Tronkaano! Fajren kun li!" Kolhaas kaj liaj kompanoj sidiĝas sur benko antaŭ la podio. Venceslao venas dum la bas-kriado de la amaso, Nagelschmidt volas transdoni al li sian lokon sur la benko, sed li ne akceptas ĝin. Li restas staranta. La membroj de la tribunalo marŝas sur la podion: Zauner, Eibenmeyer, Müller, flanke sidas: Kallheim, Hinz, Kunz.

EIBENMEYER Kuncivitanoj! Mi petas silenton, ordon! La princo elektisto ordonis la proklamadon de la verdikto ĉi tie, sur la foirplaco de Dresdeno ne por bruado, sed por ekzemplodono. Niaj armitaj gardistoj arestos surloke la rompintojn de la ordo. Lia barona moŝto Venceslao de Tronka! Ĉu ĉeestas?

VENCESLAO Ĉeestas.

EIBENMEYER Kolhaas, Mikelo, ĉevalkomercisto. *(Kolhaas stariĝas.)* Jes. Bonvolu resti staranta. Ni devas aŭskulti la verdikton de la princo elektisto kaj la imperiestro. Prokurora moŝto Zauner ...

ZAUNER

Mikelo Kolhaas, jen venis la tago, kiu ĵetos plenan lumon sur vian veron. Post kiam mi garantiis al vi liberan foriron el Tronka, detalon post detalo mi ekzamenis vian celon, kiu puŝis vin tien. Ni konstatis, ke vin kondukis nek rabista intenco, nek servutula pasio de la renverso de nia paca sociordo, sed ekskluzive la reakiro de viaj pokaj proprietaĵoj, eroj de via vero. La superularon destinitan de Dio, sian regnestron honoras tiu, kiu restas fidela al ties proklamitaj veroj. Je la pano estas senigita tiu, kiu lasas perdi ties erojn. Ĝuste pro tio ni ordonis en ĉi tiu tago: viaj du nigraj ĉevaloj estu restituitaj en stato, kiel vi juste deziris — kun tintiloj. Simile estu redonitaj viaj senjuste enkasigitaj kvindek groŝoj kaj la manteloj, ĉapelo, vojaĝsako de via servisto nomata Herse kun la personaj objektoj trovitaj en ĝi, nome: argila pipo, tindro, fajroŝtono, dekdu groŝoj kaj unu pippurigilo kun osta tenilo. Dato en Brandenburgo. Princo elektisto Frederiko ... Kiu, signe de sia favoro, dezirus komuniki sian decidon persone. La regnestro petas vian pardonon, Mikelo Kolhaas, sed hodiaŭ li devas gastigi la imperiestron. Ankaŭ la im-

periestro petas vian pardonon, ke pro sia speciala okupiteco li estas devigita komuniki sian decidon al via peticio transdonita de via edzino, Elizabeta Kolhaas tra la imperiestra prokuroro Francisko Müller. Sinjoro Müller ...

MÜLLER Karolo la Kvina, pro dia graco nia Romia Imperiestro, ĉiama pliiganto de la imperio, reĝo de Germanio, Hispanio, ambaŭ Sicilioj, Jerusalemo, Hungario, Dalmatio, Kroatio kaj tiel plu, arkiduko de Aŭstrio, grafo de Habsburgo, Flandrio kaj Tirolo signas proprame la suban kompletigan decidon en la procesafero, klarigita per la justa mano de la Brandenburga princo elektisto: vergo kaj skoldoj rezultigas saĝecon; sed infano liberlasita malhonoras sian patrinon. Samtiel makulis la senpartiecon de la Brandenburga kancelario sinjoroj Hinz, Kunz kaj Kallheim: en la hodiaŭa tago ĉiujn tri ni eksigas el siaj oficoj. *(La amaso ekjubilas.)* Kaj ĉar ĉiu lezo de la leĝo ofendas la Personon de la Plej Supera Leĝdonanto, estu kondamnita barono Venceslao de Tronka al dujara prizona puno. *(Silento de konsterniĝo. En tiu momento eksonas kornoj, poste aŭdiĝas kanonpafo. El la ne-*

videblaj anguloj de la placo miksiĝas en la bruon la sonorado de la sonorileto j de la ĉevaloj de Kolhaas. Tribunala servisto transdonas al Kolhaas la mantelon, ĉapelon, vojaĝsakon de Herse. La amaso rapide disiĝas. Krioj: "Jen la imperiestro! Ni renkontu la imperiestron! Vivu la imperiestro!" En severa teniĝo restas nur kelkaj armitaj tribunalaj servistoj en la proksimeco de Kolhaas. Kolhaas malrapide konsciiĝas sub la pezo de la neatendita venko. Li gapas post la amaso tumultanta en la direkto al la kanonpafo.)

KOLHAAS Homoj bonaj! Ĉu nun vi lasas min sola? Ĉu neniu plu scivolas pri la orgojla Tronkaano? Homoj! Vivu la imperiestro! Li alportis mian palmodimanĉon ... Vivu la imperiestro! *(Al Nagelschmidt, kvazaŭ finreplike al ĉiuj iliaj disputoj.)* Vivu la imperiestro! *(Nagelschmidt senmovas.)* Eĉ se malfrue ... Li alportis mian palmodimanĉon. Ĉu vi aŭdas, Karolo? Venceslao de Tronka estu juĝita al dujara prizona puno. *(Ebrie li gustumas la vorton.)* Juĝita ... Juĝita ... Elinjo sendas ombron da konsolo el sia tombo: Juĝita! *(Triumfe.)* Ripetu, Müller, kara amiko, kiel blinda muelejo turnu via lango la vorton: juĝita.

MÜLLER *(emociigite kaj ŝvitoplene)* Juĝita.

KOLHAAS Ho, se ankaŭ Elinjo aŭdus tion, Karolo! *(Li brakumas Nagelschmidt.)*

NAGELSCHMIDT Ŝi aŭdas certe.

KOLHAAS Ŝi alportus al mi ..., al ni ĉi tiun mesaĝon. Kiel povas tiom distiĝi homo kaj kvitiĝo unu de la alia? Mi dankas vin, Karolo, ke vi stariĝis apud mi ... Almenaŭ ĉi solan torĉan vorton — juĝita! — ni povis reakiri azile.

NAGELSCHMIDT Malmulta.

MÜLLER Ne finiĝis, Mikelo, la teksto de la imperiestro. Ĉar kiom ajn mallongas la tera vivo de la homo, kaj kiom ajn longas kaj turmentas la vojo de la vero: neniu rajtas ĝin serĉi arbitre, sur flankopadoj.

KOLHAAS Kiel ĉi tiu Tronkaa porko!

MÜLLER Ĉar la vero forturnas sin de tiu, kiu per maljusta maniero proksimiĝas al ĝi; ĉar rajton oni povas akiri nur per rajto, saviĝon de la animo nur per humileco. Vi rericevis ĉion, Mikelo Kolhaas, ĉion, je kio vi estis pririajtigita, sed ne forgesu, dum oni postkuras la veron: oni ankaŭ ŝuldiĝas.

KOLHAAS Mi ĉipvendis ĉion mian.

MÜLLER Nun jamas via vico senŝuldigi vin.

NAGELSCHMIDT Ĉu lia? Eble tiu de la Tronkaa Antikristo! Ĉiuj perditaj proprietaĵoj de Kolhaas estu restituitaj!

MÜLLER *(laŭgrade severiĝinte, elŝirinte sin el la ĝena ligiteco de la amika rilato)* Nun jamas via vico senŝuldigi vin.

(Kolhaas rigardas Müller ĉiam pli frapite.)

NAGELSCHMIDT Ni ne senŝuldigas nin! Ni postulas.

EIBENMEYER Vera instruo estas la instruo de la imperiestro.

MÜLLER *(legas)* Vi bruligis kastelojn, estingis homajn vivojn, por la juro vi tretis sur la vojon de la jurrompo ...

NAGELSCHMIDT Kion alian li povus fari? Kiel ni alproksimu la krucumitan veron, se latronoj de Pilato gardas ĝin — kontraŭ ni! Kiel oni povus liberigi la juron el sia sigelita tombo sen disbati la armeon de la fariseoj? Prokurora moŝto! Ĉu nia pleja vero, al kiu ni konstruis preĝejojn, venis eble pace kaj kun humilaj peticioj al Kajafas aŭ la judasoj? Ĉu ne per tertremo kaj rokofendo liberigis kaj levis al si Dio sian solenaskitan filon? Ĉu unusolan vojon desti-

nis al ni la imperiestro? Por unusola irebla vojo — iun neireblan?

EIBENMEYER Nagelschmidt konfuzas sin kaj siajn bruligistajn kompanojn kun la Leĝo kaj ...

NAGELSCHMIDT Tie ja la homo komenciĝas! Kiam li konfuzas sin kun ĉio, je kio li estas senigita.

EIBENMEYER Gardo!

(Du soldatoj silentigas Nagelschmidt.)

MÜLLER Mikelo Kolhaas, loĝanta en Kolhaasenbrück, naskita la dekduan de junio 1502 en Schwerin, estas kondamnita en ĉi tiu tago al morto per ŝnuro. Dato kiel supre, propramana subskribo de la imperiestro.

NAGELSCHMIDT Dio mia! Oni trompis vin! Oni trompis vin! Latronoj, vi trompis lin, priinsidis lin, faligis lin en kaptilon, kial ni obeis vin? Oj, mi stulta, kiu nur pli ol Mikelo Kolhaas stultis! ... Mi povus scii ... ĉiuj iliaj vortoj haladzas je hiena fetoro, kaj per ĉiuj siaj ruzaj cedoj ili nur kamuflas siajn finajn celojn. Sinjoro Müller! Vi pruntis vian langon al la malnobla verdikto — elŝiru al vi la langon. Vi pruntis al ĝi vian voĉon — tratranĉu al vi la gorĝon!

MÜLLER La voĉo estis mia — la decido tiu de la imperiestro, Mikelo. Pardonu min.

KOLHAAS Ĉu via lasta deziro? *(Konvulsia ridego.)* La lasta deziro de la proklamantoj de verdiktoj: ni pardonu ilin. *(Lian denovan ridegon interrompas la triumfa-moka ridego de Venceslao. La sinjoroj akompanas la Tronkaanon eksteren. Kolhaas, postrigardante lin.)* Ni ankoraŭ renkontiĝos! *(Al Müller.)* Sed kun vi neniam. Fari konton same ni ne plu ne bezonas ...

MÜLLER Bone vi scias ... Mi faris ĉion. El la malfeliĉa trudo de la cirkonstancoj rezultas, ke ...

KOLHAAS Estu la potenco facila al vi! Ripozu trankvile!

(Müller eliras. Sur la scenejo restas nur la koncernitoj de la pendumado. Armita gardisto, ekzekutisto, konfidito por la kontrolo de la ekzekuto ktp. Dum la pendumilo estas surloke starigata, Nagelschmidt rigardas Mikelon senespere, kun malpleniĝinta rigardo.)

KOLHAAS Vi plenkreskigos Henrikon, ĉu ne? *(Li pendigas la amuleton ĉirkaŭ la kolon de Karolo.)* La disputo de ni ambaŭ finiĝis. La ekzekutisto punkton metas post ĝi. La malgrandan pi-

ceon transplantu el la angulo de nia ĝardeno al Schwerin. Mi plantis ĝin laŭ la deziro de Elinjo, ĉe la naskiĝo de nia infano. Atentu, ne lezu ĝiajn radikojn. Akvumadu ĝin, por ke ĝi refortiĝu. Kiel mildas nun via vizaĝo, Karolo. Neniam mi vidis vin tiel milda. Kvazaŭ vi uzus la viŝtukon de Jesuo. Sur kiu konserviĝis liaj trajtoj. Ni estus bezonintaj lian paciencon — unu al la alia en la komuna danĝero. *(Nagelschmidt viŝas al si la larmojn.)* Henriko ne vidu viajn larmojn. Ĉu vi opinias, ke firmiĝos tiu malgranda piceo en Schwerin? La sonoriletojn religu sur la kolojn de la du nigraj ĉevaloj. Kiun vojon vi iros?

NAGELSCHMIDT Kiu kondukas al Tomaso Münzer.

KOLHAAS Tiu konvenas. Plej mallongas. Kondukas hejmen.

(La ekzekutisto haltas antaŭ Kolhaas. Tamburado, poste silento. De fore aŭdiĝas la sonoriletoj de la du nigraj ĉevaloj. Eksonas sonoriloj honore al la imperiestro. La scenejo laŭgrade mallumiĝas.)

NAGELSCHMIDT *(lia voĉo)*

Ĉu estis ĉu ne la fato
Nigre flugrajdis la fato
En Kolhaasenbrück
Sur komerciston
Mikel' Kolhaas frapis la fato.

KURTENO

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-172-0